

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Estrara
Raporto 1994**

**Vokas
Bona Espero**

Kiel lingvas Eŭropa Unio?

Enhavo

- 101** Edukado: Por resti sur la mapo de Brazilo (Rudolf Fischer)
- 102** Lingvaj proceduroj en Eŭropa Unio (Detlev Blanke)
- 104** Azio: Altnivela turismo en Nepalo (Bharat Ghimire, Niza Kuiterman)
Eŭropo: Litovoj en la Zilbernik-domo (*Litova Stelo*)
- 105** Ameriko: Indianoj venkas (Trevor Steele)
Instruado: Per bastono al paradizo? (Aleksandr Malacion);
Sen sindevigoj (Giorgio Pagano, *L'Esperanto*)
- 106** Junularo: Duobla premiero ĉe TEJO (Saskia Idzerda)
Estrara Raporto: Universala Esperanto-Asocio en 1994
- 107** Ĝeneralaĵoj: Pluraj malkreskoj, iom da kresko
- 108** Administrado: Vasta taskaro efike mastrita
Financo (respondeca estrarano: Bakker): Daŭra strebo produktas bonan rezulton
- 110** Kongreso (resp. estrarano: Lipari): Pesimistoj malpravis
Revuoj: *Kontakto* sur solida bazo
Eksteraj rilatoj kaj informado (resp. estrarano: Fettes): Laboro sendrama sed grava
- 112** Landa kaj regiona agado (resp. estrarano: Lins): Kulminis azia agado
- 113** Instruado: Milo da mendoj por Mazi
Kulturo (resp. estrarano: Lipari): Ne direkti, sed varti
- 114** Esploro kaj dokumentado (resp. estrarano: Fettes): Pli da UN-atento al CED
Faka agado/Scienca aplikado: Novaj asocioj kaj terminaroj
Finaj vortoj: Nigro kaj ruĝo
- 115** Financaj aldonaĵoj
- 117** Laste aperis
- 118** Fake – Loke
- 119** Oficiala informilo
- 120** Nekrologoj: Douglas B. Gregor (1909-1995);
Oskari Lehtivaara (1909-1995); Anoncetoj

Vi trovos

numeron pli kolektive verkitan ol kutime: la Estraro raportas pri la faroj kaj atingoj de 1994. Post trijara paŭzo ĉi tiu jarraporto aperas denove sur la paĝoj de nia revuo (p. 107-116). Sed la instigo kiu povus ŝanĝi vian vivon, venos eble ne el la Raporto: ĝin vi trovos ĉi-apude, inviton de Bona Espero el Brazilo. Vizitu tiun mirindan landon, kie eĉ povas okazi ke indianoj venkas esperantistojn — feliĉe, nur en piedpilko (p. 105). Sportemaj samlingvanoj vojaĝis ankaŭ al Nepalo, por kunĝui Himalajan Renkontiĝon de la entreprenema Nepala E-Asocio (p. 104). Ĉu sekvos pli vigla Esperanto-turismado en landoj de Azio, Afriko, Latin-Ameriko...?

La kovrilo: La kunsidhalo de Eŭropa Parlamento en Strasburgo. La lingva problemo en la eŭropaj institucioj, la metodoj per kiuj oni provas solvi ilin, kaj la kostoj neeviteblaj — jen temoj pri kiuj preskaŭ ĉiuj esperantistoj (eĉ ne nur eŭropaj) aŭdis tion kaj jenon. Detlev Blanke nun klopodas disigi faktojn de fantazioj (p. 102-103).

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 33; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: (010) 436 1044; 436 15 39.

Telefakso: (010) 436 17 51.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Osmo Buller.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, reprezentado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. +44/(0)181/542-03-02; fakso 715-40-10.

Vicprezidanto (landa kaj regiona agado): d-ro Ulrich Lins, Gemarkenstr. 150, DE-51069 Köln, Germanio; tel. +49/(0)221/680-32-50.

Ĝenerala Sekretario (informado, eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark T. Fettes, 158 A Henderson Avenue, Ottawa, Ontario, Kanado K1N7P6; tel. +1/613/565-92-82; fakso 565-92-79.

Estrarano (financo): s-ro Hans Bakker, Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; tel. +31/(0)20/642-18-53.

Estrarano (azia agado): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 11, Seoul — 158-600, Korea Respubliko; tel. kaj fakso +82/(0)2/646-54-13.

Estrarano (kulturo, kongresoj): s-ino Michela Lipari, Viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; tel. +39/(0)6/39-72-61-98; fakso 39-72-61-69.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ino Marija Belošević, Sveti duh 130, Črnomorec, HR-41000 Zagreb, Kroatio; tel. +385/(0)1/576-092; fakso 433-407.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Danny ten Haaf, Clarensteeg 2 G, NL-2312 WJ Leiden, Nederlando; tel. kaj fakso +31/(0)71/148-801.

Por resti sur la mapo de Brazilo

En Brazilo Esperanto troviĝas laŭlitere "sur la mapo", dank' al la bieno-lernejo kiu portas la nomon Bona Espero. Kiel fartas nuntempe tiu institucio, de pli ol 20 jaroj gvidata de la esperantistaj geedzoj Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia?

En marto kaj aprilo 1995 d-ro Rudolf Fischer vizitis Bonan Esperon, kun du nederlandaj esperantistoj kaj siaj tri gefiloj. Ges-roj Hedwig kaj Rudolf Fischer estas prezidanto resp. trezoristo de la societo Bona Espero, kiu per donacoj de esperantistoj ebligas la edukadon de pli ol 30 infanoj en tiu internulejo en la brazila

laboron pro kiu ili estas famaj. Tamen, ili nun eksentas aĝon kaj lacecon, kaj planas fini sian laboron decembre de 1995 (post la lernojaro). Devos komenciĝi nova epoko de Bona Espero kun novaj gvidantoj, aŭ — kia imago! — la infanoj devus esti retransdonataj al la trista sorto kiu multajn el ili atendis.

Fotis: Rudolf Fischer



Infanoj de Bona Espero kun helpantoj Marian Łuczywo el Pollando (meze) kaj Gunnar Fischer el Germanio (tute maldekstre)

savano. La vizitantoj celis sperti la ĉiutagan laboron en Bona Espero kiel helpantoj. Fakte, tio sukcesis foje pli ol dezirite. Zorgi pri 32 infanoj signifas precipe plenumi sufiĉe malromantikajn taskojn: lavi vestaĵojn (permane!), purigi ĉambrojn, balai vojojn, akvumi bedojn, prepari manĝaĵojn ktp. Kaj oni ne forgesu: krome restas la tuta laboro gvidi ŝtate agnoskitan lernejon kun (ĉi-jare) 7 klasoj!

En Bona Espero vivas nuntempe 32 infanoj; 3 pliaj, loĝantaj en la ĉirkaŭo, vizitadas la lernejon. La najbara urbo Alto Paraíso pagas du instruistojn; plia instruisto venadas libervole. Por la tuta cetera laboro do restas la du gvidantoj, ges-roj Grattapaglia, plus la kuiristino kaj unu pagata helpanto. Tio neniel sufiĉas!

Novaj gvidantoj serĉataj

Tial Bona Espero havis kutime multe malpli da infanoj — alikaze ges-roj Grattapaglia ne estus kapablaj dum pli ol 20 jaroj fari tiun grandiozan

Finance la situacio de Bona Espero estas — danke al la donacemuloj — stabila; la lernejo (kaj tial Esperanto) ĝuas altan renomon en la tuta regiono. Nuntempe la pli aĝaj infanoj povas viziti la klasojn 9-11 (ĝis abiturienta ekzameno kiu rajtigas instrui en lernejoj) ankaŭ en Alto Paraíso, 20 km-ojn for de Bona Espero. Tiu urbo aliflanke ĵus donacis al Bona Espero 8 parcelojn de po 360 m², kun la kondiĉo konstrui tie dometojn por instruistoj kaj infanoj. En la tuta nordo de la ŝtato Goiás nur Alto Paraíso kaj

Bona Espero havas pli ol la unuajn kvar klasojn; la pluekzisto de la internulejo estas do esenca por la regiono. Cetero: nova mapo de la federacia ŝtato Goiás enhavas lok-indikon "Escola Bona Espero"!

Restas do la problemo de novaj gvidantoj. La kuratoroj de Bona Espero (Brazilo) kaj la estraranoj de la societo Bona Espero (Germanujo) alvokas parojn — nepre esperantistajn! — finance sendependajn (ĉar salajroj ne pageblas, poŝmono eble), kiuj ŝatas vivi kun infanoj, ke ili anoncu sin al la suba adreso por pli da informoj.

Serĉatas virinoj kaj viroj por jenaj postenoj: lernejestro (laŭeble brazila ŝtatan), agrikulturisto, teknikisto, kuiristo, organizisto (kiu havigas nutraĵojn kaj materialojn) kaj librotenisto. Por dividi la laboron, ĉiu paro transprenu 5 ĝis 8 infanojn, vivante kun ili kiel en familio. Kandidatoj al posteno povus provcele vivi iom da tempo en Bona Espero, antaŭ ol findecidi resti tie.

Do, kiu sobre kaj realisme sentas sin altirata de la ideo respondecigi por infanoj en Bona Espero, skribu:

Al la subtena societo: Bona Espero r.a., s-ino Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, DE-48356 Nordwalde, Germanujo. Tel. +49/2573/626; fakso (nepre menciu "por Rudolf Fischer"): +49/251/835-277; retpoŝto: fischru@dmswwu1a.uni-muenster.de.

Aŭ rekte al: Fazenda Escola Bona Espero, ges-roj Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, BR-73770-000 Alto Paraíso (Goiás), Brazilo.

Rudolf Fischer (Germanio)

Savi vivon kaj vidon

En malmultaj lokoj de la mondo la sorto de homoj handikapitaj estas tiel senperspektiva kiel en Albanio. Ĝuste tiujn ĉi homojn helpas Agado "E-vid-E-nt-E", dank' al kiu starigis "Okulcentro" en la polikliniko de Durrës. Ĉar en Albanio mankas institutoj por vidhandikapitoj, "E-vid-E-nt-E" nun planas realigi tian centron. Esperantistoj kiuj pretas helpi materie aŭ servi volontule en Albanio, kontaktu: Jacques A. Tuinder, Hene-gouwenlaan 35, 1966 RH Heemskerk, Nederlando; UEA-konto "jajt-e".

Helpo necesas ankaŭ por ebligi operacion de reno-transplanto, kiu povus savi la vivon de Beharë Skeja, 21-jara albana junulino.

La sekva skizo nek povas doni precizan priskribon de la lingva situacio en EU nek diras ion esence novan al la informitaj Esperantaj “eŭropistoj”. Sed ĝi, kaj la fakliteratura elekto, eble iom helpu sekvi pli detale la lingvopolitikan diskuton inter la koncernaj fakuloj.

En Eŭropa Unio aktuale membras 15 ŝtatoj: Aŭstrio, Belgio, Britio, Danio, Finnlando, Francio, Germanio, Grekio, Hispanio, Irlando, Italio, Luksemburgio, Nederlando, Portugalio, Svedio. La *jure* samrajtaj lingvoj de EU estas la angla, dana, finna, franca, germana, greka, hispana, itala, nederlanda, portugala, sveda.

Kio estas laborlingvo?

La jura bazo por la nuntempe valida oficiala lingvopolitiko de EU estas la artikolo 217 de la fonda Traktato de Romo (1957) de la siatempe nur kvarlingva Eŭropa Ekonomia Komunumo (EEK), kies paragrafo 1 tekstas: “La oficialaj lingvoj kaj la laborlingvoj de la Komunumo estas la germana, franca, itala kaj nederlanda” (kp. Haarmann 1993, 326). La artikolo 217 fiksas la lingvopolitikan “egalecan principon”, do la kompletan samrajtecon de la lingvoj de la tiamaj membro-ŝtatoj de EEK, kontraste al UN, kie regas la “kolegeca principo”. Ĝi validas ne nur por EEK sed por la tuta Eŭropa Komunumo (EK) fondita en 1967 (= kunfandiĝo de EEK kun Eŭropa Komunumo por Karbo kaj Ŝtalo kaj Eŭropa Atom-Energia Komunumo), kiu ekde la Matriĥta Traktato en 1993 estas nomata EU. La teksto de la menciita artikolo 217 tra la jaroj ŝanĝiĝis nur pro aldonado de la lingvoj de la nove akceptitaj membroŝtatoj. Laŭ ĝi la organoj de EEK (kaj nuntempe sekve de EU) rajtis mem difini “en siaj proceduraj regularoj kiel aspektu en la detaloj ĉi tiu reguligo de la lingvodemandado”. Difinojn deviantajn de tio la organoj ĝis nun ne fiksas. En neniuj jura dokumento troviĝas oficiala difino de tio kio estas “oficiala lingvo” (*official language, langue officielle, Amtssprache*) aŭ “laborlingvo” (*working language, langue de travail, Arbeitssprache*). En gazet-artikoloj foje legeblas asertoj ke la angla kaj la franca estas “laborlingvoj”. Eĉ registara dokumento de Germanio rezolucias ke la germana postulas “apud la angla kaj la franca fiksiĝon kiel samrajta laborlingvo en la praktiko de Eŭropa Komunumo” (tiele en Rezolucio de 20.5.1994 de la Konsilantaro de la Federaciaj Landoj de Germanio, kp. *Mitteilungsblatt für Dolmetscher und Übersetzer*, 4-5/1994, p. 40-41). Tiu kaj similaj postuloj — apogataj ofte per tute krude potencpolitikaj motivoj — iom ilustras la konfuzon kiu foje regas eĉ en politikistaj medioj pri la jura lingvopolitika situacio en EU. Ĉiuj supre menciitaj EU-lingvoj ja estas jam de longe kaj “oficialaj” kaj “laboraj”. Ekster tiuj kategorioj troviĝas la diversaj minoritataj lingvoj (kies stato kaj konsidero en EU nun estas diskutata) kaj la lingvoj de la loĝantoj devenantaj el ekster EU (ekz. turkoj en Germanio). Al la oficialaj (kaj laboraj) lingvoj ne apartenas la luksemburga kaj la irlanda (gaela); en la lastan tamen tradukiĝis diversaj EU-dokumentoj.

Ĉar la preferata kutimo ĉe tradukado kaj interpretado (samtempa kaj sinsekvaj) ĉefe estas transigo el la fremda lingvo en la gepatran, ĉiuj membroŝtataj delegacioj kune plej bonŝance devus disponi pri tradukistoj/interpretistoj por 110 lingvo-direktoj. Ĉar la tradukservo de EU ne povas disponigi interpretistojn por ĉiuj lingvodirektoj, oni ofte utiligas difinitan tradukkabinon kun “granda lingvo”, plej

Lingvaj pr en Eŭropa



**Por sobre
prijugieventualajnŝancojn
de Esperanto en
Eŭropa Unio (EU)
kaj laŭ tio ellabori
konvenan strategion,
necesas detala konatiĝo
kun la lingvopolitika pejzaĝo
de EU, surbaze de la (unuavice
neesperantista) faka literaturo.**

**Malofte regas ĉi-tiome radia
entuziasmo pri Eŭropa Unio.
Kaj kiam temas pri ties
lingvoproblemo, la
ridetoj malaperas.**

ofte la angla aŭ la franca, kiel “relajson”. Tio povas ekz. signifi ke ĉe la interpreto de dana parolado en la grekan la greka tradukisto transprenas la eldanigon el la angla kabino, tiel tradukante la origine danan fontotekston el la angla en la grekan, ĉar mankas greko tradukanta rekte el la dana. Estas klare ke la tradukado de absolute ĉiuj dokumentoj kaj la interpretado de ĉiuj paroloj en ĉiujn oficialajn lingvojn de EU estas nek teknike nek ekonomie farebla. Pro tio inter la jura lingva samrajteco kaj ties realigo estas granda diferenco, kun diskriminaciaj sekvoj. Kvankam oficiale ne ekzistas apartaj laborlingvoj, en la ĉiutaga praktiko de la organoj de EU tamen reliefiĝis neoficialaj “laborlingvoj” (gvidlingvoj), nome la franca kaj la angla (aŭ inverse), trialoke eble la germana kaj la hispana (aŭ inverse). La tradukservoj de la diversaj organoj de EU kunformas la plej grandan

oCEDUROJ Unio



lingvoservon de la mondo. Pri la kostoj de la lingvoservoj ekzistas malsamaj taksoj. Laŭ Coulmas (1991b, 30) ili estas ĉ. 30-60% de la administra buĝeto (depende de la organoj de EU), kiuj kune tamen formas (laŭ Brackeniers 1992, 10) nur 2% de la *tuta* buĝeto de EU. La lingvoservo de la Komisiono (SCIC, *Service commun interprétation-conférences*) laboras laŭ la principo de la “efektiva bezono”. Laŭ tio la interpretendaj kunsidoj dividiĝas en: (a) kunsidoj kun plena tradukado (en ĉiujn koncernatajn lingvojn), kaj (b) kunsidoj kun parta tradukado (traduko en nur kelkajn lingvojn). Tipo (a) ĉefe koncernas prestiĝkarakterajn kunsidojn (i.a. kun gravaj reprezentantoj de la membroŝtatoj). Tipo (b) ĉefe koncernas aranĝojn kun multlingva spertaj diplomatoj kaj oficistoj. Alia procedo estas la “nesimetria tradukado”, kiam ĉiu delegito uzas laŭplaĉe sian gepatran

lingvon, sed la paroladoj estas tradukataj nur en kelkajn cellojajn kompreneblajn por la plejmulto de la aŭskultantoj. Oni elektas la cellojajn depende de la kunsidanoj, de la traktataj temoj kaj de la disponeblaj interpretistoj (kp. Heynold 1993).

Lastatempe en lingvopolitikistaj kaj sociolingvistaj rondoj plioftiĝis aludoj kaj proponoj pri ŝanĝoj de la aktuala lingva reglamento. La ĉefaj akre diskutataj proponoj, kiuj ne ĉiam ekskludas sed foje kompletigas unu la alian, estas jenaj:

1. Principa konservo de la nuna sistemo, sed kun drasta redukto de kostoj, i.a. per plia apliko de elektronikaj rimedoj, krome per disdono de diversaj taskoj al la membroŝtatoj (Brackeniers 1992).

2. Pli bona rego de pli da lingvoj.

3. Pasiva multlingveco (Finkenstaedt/Schröder 1992).

4. Konkurenco de la lingvoj kun venko de la plej fortaj.

5. Fikso de unu *lingua franca*, do gvidlingvo, laborlingvo (ĝenerale la angla, kvankam neŭtrala planlingvo estas maloftege — tamen foje — menciita kiel teoria modelo).

6. Fikso de limigita nombro de laborlingvoj.

7. Disdivido de EU en sub-EU-ojn, kiuj interne reguligu siajn lingvoproblemojn kaj komunikadu inter si per unu aŭ du laborlingvoj (Brackeniers 1991).

Kio post Mastrohito?

Signalo por tio ke certaj influhavaj rondoj en EU favoras la enkondukon de limigita nombro da laborlingvoj (gvidlingvoj), distingendaj de la oficialaj lingvoj, troveblas en la Mastrohta Traktato (fina akto: deklaroj). La “Deklaro pri la uzo de lingvoj en la kampo de la Komuna Politiko pri Eksteraj Aferoj kaj Sekureco” tekstas: “La Konferenco interkonsentas ke por la uzo de lingvoj validas la reguloj pri la lingvoj de la Eŭropaj Komunumoj. Por la COREU-interrilatado [= *correspondance européenne*, t.e. la skriba komunikado de ministerioj pri eksterlandaj aferoj kaj de diplomaciaj instancoj] la *aktuala* praktiko de la Eŭropa Politika Kunlaboro *certatempe* servas kiel *orientigo*. Ĉiuj tekstoj de Komuna Politiko pri Eksteraj Aferoj kaj Sekureco, prezentitaj aŭ akceptitaj dum la kunvenoj de la Eŭropa Konsilantaro kaj de la Konsilantaro de Ministroj, same kiel ĉiuj tekstoj destinitaj por publikigo, devas esti tradukataj senprokraste kaj samtempe en ĉiujn oficialajn lingvojn de la Komunumo” (Läuffer 1992, 258-259; miaj elstarigoj). La COREU-lingvoj estas la franca kaj la angla.

Detlev Blanke

Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, Germanio

Literaturo

(precipe germanlingva; por pli detala bibliografio turnu vin al la aŭtoro)

AMMON, Ulrich (1991a): *Die internationale Stellung der deutschen Sprache*. Berlin-New York: De Gruyter, 633p.

AMMON, Ulrich/HAARMANN, Harald (1991 eld.): Focus: Status and Function of the Languages in the Political Bodies of the European Community. En: *Sociolinguistica. International Yearbook of European Sociolinguistics* N-ro 5. Tübingen: Max Niemeyer, 220p.

BRACKENIERS, Eduard (1991): Europäische Integration und Probleme der Sprachkommunikation.

En: *TextconText* 6 (1991) N-ro 1, p. 1-8.

BRACKENIERS, Eduard (1992): Europa bleibt mehrsprachig. En: *EG-Informationen* N-ro 10, p. 9-12.

COULMAS, Florian (1991a eld.): *A Language Policy for the European Community. Prospects and Quandaries*. Berlin-New York: Mouton de Gruyter, 308 p.

COULMAS, Florian (1991b): Die Sprachenregelung in den Organen der EG als Teil einer europäischen Sprachenpolitik. En: Ammon/Haarmann 1991, p. 24-35.

FINKENSTAEDT, Thomas/Schröder, Konrad (1992): *Sprachen im Europa von morgen*. Berlin-München: Langenscheidt, 57 p.

HAARMANN, Harald (1993): *Die Sprachenwelt Europas*. Frankfurt/M.-New York: Campus, 372 p.

HEYNOLD, Christian (1993): Das Dolmetschproblem. En: Regozini 1993, p. 52-54.

LÄUFFER, Thomas (1992 eld.): *Europäische Gemeinschaft — Europäische Union. Die Vertragstexte von Maastricht*. Bonn: Presse- und Informationsamt der Bundesregierung, 272 p.

LEITNER, Gerhard (1991): Europa 1992? A Language Perspective. In: *Language Problems and Language Planning* 15 (1991) N-ro 3, p. 282-296.

REGOZINI, Georg M. (1993 eld.): *The communication and the lan-*

guage problem in the European Community — In what extent a “planned language” could contribute to its solution? (Conference, 29.9.1993, European Parliament, Brüssel; Hanns Seidel-Stiftung, 138 p.

SCHRÖDER, Konrad (1992): Kommentierte Auswahlbibliographie zur sprachlichen und sprachpolitischen Problematik Europas. En: *Die Neueren Sprachen* 91 (1992) N-ro 4-5, p. 492-516.

Informoj pri nova literaturo pri la eŭropa lingvoproblemo aperadas en Informilo por Interlingvistoj, redaktata de Blanke kaj abonebla ĉe la Libroservo de UEA.



Altnivela turismo en Nepalo

Jen trafa ekzemplo pri la potencialoj de per-Esperanta turismo: 14 e-istoj el 7 landoj kune turismis kaj kongresis en Nepalo.

Nepala E-Asocio (NEspA) kaj la agentejo Sierra Travel and Tours organizis inter la 26-a de februaro kaj la 9-a de marto Internacian Himalajan Renkontiĝon por 14 eksterlandanoj venintaj el Germanio, Italio, Japanio, Koreio, Nederlando, Norvegio kaj

Svislando. Por NEspA, kiu neniam antaŭe aranĝis internacian eventon, tio estis historia momento.

La organizantoj faris ĉion por montri kiom eble plej multe el sia bela lando: la antikvan urbon Bhaktapur, la sanktejon Pashupatinath, la urbojn

Patan, Katmanduo kaj Pokhara ... Dum kvartaga piedvagado tra montoj la gastoj tranoktis en tendaroj, kaj "rajdis" la riveron Trisuli per flosoj.

La programon kronis duontaga kongreseto la 8-an de marto, inaŭgurita de la vic-kanceliero de Reĝa Nepala Akademio, Madan Mani Dixit. Niza Kuiterman transdonis saluton de UEA. Raporto estis dissendita de la nacia televido en la sama vespero.

En la dua parto — nur esperantista — oni parolis pri la loka movado kaj la renkontiĝo mem. La partoprenintoj subskribis deklaron, laŭ kiu ili "admiris la seriozan [prepar]laboron kaj la afablecon" de la gastigantoj, kaj konstatis ke la nepala "movado evoluas bone kaj meritas atenton kaj subtenon". Laŭ Kuiterman, la kondiĉoj estis eĉ tro luksaj ("oni dorlotis nin"), pro kio neniu nepalano povis partopreni la tutan aranĝon.

Kuraĝigite de la sukceso, NEspA decidis favore al dua Renkontiĝo — kies dato estas anoncota.

Laŭ raportoj de Bharat Ghimire (Nepalo) kaj Niza Kuiterman (Nederlando)

EŬROPO

Litovoj en la Zilbernik-domo

Ekde januaro 1995 la domo en Kaunas kiu apartenis al Aleksandro Zilbernik, la bopatro de Zamenhof, estas scenejo de granda Esperanta aktiveco.

Ankoraŭ ne ĉiuj planitaj fakoj (vd. feb. '94, p. 24) de Kaunasa E-Centro funkcias. Ne estas ordigata la arkivo, ne komenciĝis instalado de la muzeo, ne laboras eldona centro kaj vojaĝ-agentejo. La kaŭzo estas la sama: mankas homoj kaj mono.

Tamen, ja funkcias librobutiko. Estas ordigata kaj katalogata la biblioteko: Petras Čeliaskas faras tion bedaŭrinde mane, ĉar la E-Centro ne posedas komputilon. La libraro riĉiĝis per valora heredaĵo de la E-pioniro Albinas Vebeliūnas (vd. jan., p. 20) kaj per multaj donacoj — i.a. de Sveda E-Federacio, kaj E-organizoj el Belgio, Francio, Germanio kaj Japanio.

En la E-Centro estas organizata la 31-a BET (Baltiaj E-Tagoj, 8-16 julio), redaktata *Litova Stelo*, tie kunsidas marde kaj merkrede la junulara resp. la Kaunasa kluboj, kaj dum la tuta semajno kolektiĝas kelkdekoj da homoj por lerni la lingvon en tri grupoj.

La 31-an de marto Povilas Jegorovas, prezidanto de Litova E-Asocio, enmanigis atestejojn al 52 kursfinintoj kiuj lernis E-on de la 6-a ĝis la 29-a de marto, po 90 minutoj tage, de la brazila Cseh-instruisto Aristóphio Alves Filho. Ekde la 3-a de aprilo 47 lernintoj studas plu en konversacia kurso. Ili ŝatus korespondi: kontaktu ilin ĉe Litova E-Asocio (a.d. 167, LT-3000 Kaunas).

Prioritato plua: instrui

Litova E-Asocio havas 494 individuajn kaj 32 kolektivajn membrojn. Por sia 30-a Kongreso la litovaj esperantistoj kolektiĝis 243-ope — la 10-an de decembro, en Kaunas. La kongreson salutis la e-ista urbestro, Arimantas Račkauskas, kiu invitis fondi en Kaunas centron de esperantistoj-entreprenistoj. Telesforas Lukoševičius tuŝis instru-problemojn: laŭ li, en Litovio troviĝas 70 pedagogoj povantaj instrui Esperanton, sed nur 25 instruas. En mezlernejoj E-on lernas 450 geknaboj, dum en 1970 tiu cifero estis ĉ. 1000.

La antaŭa landa kongreso decidis ke la agado prioritare direktiĝu al la E-instruado. Tion forte bremsis manko de lernilo. Feliĉe, intertempe aperis lernolibro de Adomas Vaitilavičius kaj litova-Esperanta konversacia libro de Stasys Gaidamavičius.

Per la kajero 1994/6 la dumonata LEA-revuo *Litova Stelo* (vd. dec., p. 213) atingis sian centan numeron. Ekde la centunua Adomas Vaitilavičius transdonis la redaktadon al Petras Čeliaskas. *Litova Stelo* estas abonebla kontraŭ 20 gld. jare (al UEA-konto "litv-s"); antaŭaj jarkolektoj (1991-1994) haveblas ĉe LEA por po 12 gld.

Laŭ Litova Stelo

Elektu viajn reprezentantojn!

La individuaj membroj de UEA ricevis kun la Jarlibro 1995 voĉdonilon por elekti ok komitatanojn B, kiuj reprezentos la individuan membraron en la Komitato de UEA. Ne maltrafu la limdaton: via voĉdonilo atingu la Centran Oficejon plej malfrue la 15-an de julio!

Indianoj venkas

Ne tre ofte oni legas inter la rezultoj de futbalmatĉoj: Ŝavantoj venkis Esperantistojn kaj Ŝavantoj venkis Ekologojn. Sed tiel vere estis en Barra do Garças, urbo ĉe la limo de du vastaj brazilaj ŝtatoj, Goiás kaj Mato Grosso.

Tie okazis renkontiĝo (Tutmonda Tago de la Tero, 21-23 aprilo) de ekologio, esperantistoj kaj ŝavantaj indianoj (*Xavantes* en la portugala). La futbalmatĉoj, la ekskursoj en la belajn montojn, kie abundas akvofaloj, la konkurso de kanzonoj en Esperanto kaj aliaj distraĵoj estis ja agrablaj, sed la tritaga renkontiĝo pritraktis seriozajn temojn.

La mediokonservermuloj alfrontas multajn minacojn en Brazilo, se nur menciis la detruadon de la Amazona arbarego. La indianoj serĉas aliancu-



Fot.: Trevor Steele

Ŝavantoj ĝojas post triumfo.

lojn en sia batalo kontraŭ orministoj, kiuj invadas ilian terenon.

Ankaŭ Esperanto rolis centre. Estis prelegoj en ĝi pri la ekologia situacio de diversaj landoj, teatraĵo prezentita de la infanoj de la bien-lernejo Bona Espero (vd. p. 101), kaj salutoj de la kvinlanda (trikontinenta) delegitaro; sed la lingvo ricevis tre aproban men-

cion ankaŭ de ekologioj kiuj ne parolas ĝin. En amase vizitata parko kun varmakvaj naĝejoj oni inaŭguris bus-ton de Zamenhof.

La kelkjara kunlaborado de la du verdaj movadoj evidente profitas al ambaŭ. Krome, al la tuta homaro kaj ĝia hejma planedo.

Trevor Steele (Aŭstralio/Brazilo)

INSTRUADO

Per bastono al paradizo?

Pri "Kolosa instruado" en Ukrainio ni raportis en novembro 1993 (p. 186). Kiel prijuĝas ties utilon Aleksandr Malacion, kiu ĝin mem partoprenis?

En la lernojaro 1993/94 mi instruis Esperanton en Internacia Instituto de Administro, Entreprenado kaj Juro en Slavjansk. Dank' al Gennadij Ŝilo, en tiu privata altlernejo estis kreita katedro de Esperanto kun kelkaj konstantaj postenoj (en 1993/94 laboris 5-6 geinstruistoj). La instituto havis kelkajn milojn nur da ĉeestaj studentoj — do, ĉiu el ni instruis la lingvon al kelkaj centoj da studentoj.

Kion mi persone spertis? En ĉiu lernogrupo mi vidis 0-1-2-3 anojn farantajn pli ol mi postulis — tiaj homoj kutime mem trovas E-klubon kaj rapide fariĝas "niaj homoj". Krome eblis distingi personojn kiuj diligente lernis ĉion, do ankaŭ Esperanton, ne pensante pri neceso kaj utilo. Ĉiuj aliaj ne volis lerni Esperanton. Aktive ne volis. Ne vidis neceson. Tute ne interesiĝis. Mi devis klopodi ke ili almenaŭ ne malhelpu al aliaj. Kaj temis pri absoluta plejparto.

Mi ne celas (ĉar ne povas) plene respondi al la demando ĉu povas deviga instruado de Esperanto doni bonajn fruktojn. Mi supozas ke, se ni en Slavjansk pli bone organizus la postinstruan periodon, scipovus inviti eksterlandanojn, kapablus pli konvinki pri la avantaĝoj de Esperanto — ni havus pli multe. Eble. Sed ekzistas certa diabla cirklo: por ke Esperanto utiliĝu konkrete, necesas havigi ĝin al multaj-multaj personoj, krei E-medion eksteran; dume, por ke oni lernu nian lingvon, bonvole kaj propradezire, bezonatas jama ekzisto de tiu medio.

Esperanto vere estas tre simpla (belsona, riĉesprima ktp), sed tio ne sufiĉas. Nia movado estas (kaj restos) iom idealisma. Tre multaj homoj ne estas tiaj — kaj verŝajne tio estas normala. Sed ni devas tion konsideri. Per bastono eĉ al paradizo oni ne pelu.

*Aleksandr Malacion (Rusio)
Laŭ Movado de Rusia E-ista Unio*

Sen sindevigoj

Stariginte komisionon pri Esperanto antaŭ du jaroj, la itala eduk-ministerio promesis, en februaro 1994, diskonigi ties laborrezultojn.

La promeso restis longe sen plenumo, probable pro la politikaj tumultoj de Italio. Post karnavala manifestacio de la Radikala Partio la 8-an de feb. ĉi-jare, vicministro Luciano Corradini akceptis ties delegacion. La 13-an de marto Corradini tre longe interparolis kun reprezentanto de Itala E-Federacio, Renato Corsetti, kiu informis lin pri la situacio de la E-movado en Italio.

Fine, la 10-an de aprilo la ministerio dissendis la raporton de la komisiono al la t.n. provincaj studestroj. La cirkulero invitis "favori la plej vastan konon kaj diskuton de la problemoj kaj proponoj" priskribataj en la raporto, sed deklaris ke "ne estas tasko de tiu ĉi registaro" (kiun oni opinias provizora) "alpreni sindevigojn" pri tiuj proponoj.

Laŭ informoj de Giorgio Pagano (Italio) kaj L'Esperanto

Duobla premiero ĉe TEJO

Iĝis jam tradicio ke TEJO aranĝas siajn seminariojn en Strasburgo. Post pasintjara lokŝanĝo al Ĉeĥio, TEJO unuafoje seminariis en Budapeŝto, de la 29-a de aprilo ĝis la 6-a de majo.

Al Konsilio de Eŭropo dum la lastaj jaroj aliĝis pli kaj pli da landoj el pli kaj pli orienta Eŭropo. Prave do oni konkludis ke ne plu sufiĉas unu Eŭropa Junulara Centro en Strasburgo por okazigi internaciajn junularajn kunvenojn: planiĝis dua tia centro en Budapeŝto. Ĉi-printempe, eĉ antaŭ la pretiĝo de la definitiva centro, TEJO havis la unuan okazon seminarii en la hungara ĉefurbo. La mankon de profesie ekipita kunvenejo kompensis la fakto ke ni loĝis en bela parko sur monto apud Buda kaj ĉiutage ĝuis sanigan dozon da promenado, ĉar la kunvenejo kaj la manĝejo situis en fore malproksimaj anguloj de la parko.

Sed la 35 partoprenantoj spertis eĉ pli mondiskuan premieron: unuafoje TEJO invitis al sia seminario repre-

zentantojn de kelkaj aliaj organizoj kun kiuj ni kunlaboras en internaciaj kadroj, por ke ili pli bone konatiĝu kun nia organizo kaj nia agado. Tio



Ertan el Turkio parolas angle pri minoritatoj en sia lando, precipe pri kurdoj.

signifis ke la seminario estis dulingva, kun Esperanto kaj la angla kiel laborlingvoj. Efektive, TEJO mem enkondukis lingvoproblemon en sian renkontiĝon! Ĝin oni solvis per multe da

tradukado, iom da krokodilado, kaj la akcepto de la ideo ke ne eblas ĉiam ĉion traduki por ĉiuj.

Cetere, la konstato ke ĉiuj partoprenantoj, kaj el Okcidento kaj el Oriento, komprenis la anglan, eble iom dolorigas kelkajn verdajn korojn... sed tiujn povas konsoli ke la kono de la angla ne ĉe ĉiuj sufiĉis por vera diskuto. Malgraŭ la lingvaj komplikaĵoj

ĉiuj konsentis ke indus la malfermiĝo al la ekstera mondo: la gastoj el Hungario, Nederlando, Rumanio kaj Turkio vigle partoprenis en oficialaj kaj neoficialaj diskuttrondoj, kaj kreiĝis tre bona etoso. Kaj efektive ni ĉiuj pli bone interkonatiĝis, kiel konstateblis pro rimarkoj de reprezentantoj de politika junulara organizo: ili miris ke ankaŭ TEJO, ja organizo nepolitika, tiel "politike" diskutis pri la temo.

Jes, cetere, la temo: "Malplimultoj en Eŭropo". En ĉi tiu raporto ĝi aperas nur en la lasta alineo, ĝi estis tamen nia centra diskuttemo dum la tuta semajno. Ni multe informiĝis kaj diskutis pri la situacio de la kurdoj en Turkio, de la hungaroj en Rumanio, la eŭskoj en Hispanio, kaj la ciganoj multloke en Eŭropo. La multaj laborgrupoj ebligis ke ĉiuj aktive partoprenu: ja pli ol konkludoj gravas la interŝanĝo de spertoj kaj ideoj. Jen sukcesa inaŭguro de la nova Eŭropa Junulara Centro en Budapeŝto!

Saskia Idzerda (Nederlando)

Esperanto radios tutmonden dum la UK

De la 22-a ĝis la 29-a de julio, Finna Radio ĉiutage elsendos kelkminutan Esperanto-programon, ĉiufoje antaŭ la fino de siaj anglalingvaj programoj.

Ĉi lastaj estos aŭdeblaj je la jenaj horoj kaj frekvencoj:

En Eŭropo (Universala Tempo + 2h = Mez-Eŭropa Somera Tempo): 08.45-09.00 (11755, 9560, 6120, 963 kaj 558 kHz); 21.00-21.30 (15440, 9730 kaj 6120 kHz); 23.30-24.00 (15440, 11755, 9730, 6120, 963 kaj 558 kHz).

En Nord-Ameriko (UT - 4h): lunde-vendrede: 07.30-08.00; lunde-sabate: 08.30-09.00; ĉiutage: 09.30-10.00, 11.30-12.00 (ĉiuj: 15400 kaj 11900 kHz).

En Sud-Ameriko (UT): 22.30-23.00 (11845 kaj 9650 kHz).

En Aŭstralio kaj Suda Azio (UT): 08.00-08.30 (17820, 15115 kHz); 22.30-23.00 (9665 kHz).

En Okcidenta Azio kaj Orienta Afriko (UT): 04.30-05.00 (15440 kHz).

Skribu grandnombre al Finna Radio por esprimi vian kontenton kaj peti konstantigon de la Esperanta programo! (Helsinki regule elsendas en la latina.) Adreso: Radio Finland-YLE, PL 78, FI-00024 Yleisradio, Finnlando. Tel. +358/0/14-80-43-20. Faks. +358/0/148-11-69. Retpoŝto: rfinland@yle.mailnet.fi.

Komuna Seminario

Malsame ol unue planite, la 14-a Komuna Seminario de gejunuloj japanaj, koreaj kaj — unuafoje — ĉinaj okazos en Tianjin (Ĉinio, proksime al Pekino), de la 11-a ĝis la 14-a de aŭgusto. Temo: "Junularo kaj tradicia kulturo". Adreso: Ĉina Junulara E-Asocio, P.O.K. 825, CN-100037 Beijing; tel. +86/1/832-66-82; tel./faks. 832-18-08.

Estrara Raporto: Universala Esperanto-Asocio en 1994

De tri jaroj vi ne renkontis la Estraran Raporton sur la paĝoj de ĉi tiu revuo. Tio ebligis ke ankaŭ en majo/junio Esperanto alportis al vi sian tutan gamon da artikoloj kaj novaĵoj — dum la Raporto estis pluse ricevebla el la Centra Oficejo por ĉiu petanto. Ĝi krome distribuiĝis al la komitatanoj kaj al ĉiuj asocioj ligitaj al UEA.

La Estraro nun tamen decidis reveni al la antaŭa kutimo, pro pluraj konsideroj. Unue, ĝi preferas rekte kaj amase informi la membraron pri sia agado. Due, ja ekzistas bezono je resuma dokumentado pri la sinsekvaj jaroj de nia movado. Por faciligi esplorojn, ni enmetis en la Raporton referencojn al la Jarlibro kaj al Esperanto. Pri la temo “Junularo” vd. la numerojn de TEJO Tutmonde.

Tamen, la Estrara Raporto ĉi-foje okupas nur duonon de numero, por lasi lokon ankŭ al aktualaĵoj. Tial,

strebante vaste kroniki la pasintjarajn eventojn kaj atingojn de tuta Esperantujo, ni tamen plejparte limigis nin al la agadoj iel ligitaj al UEA mem.



ĜENERALAĴOJ

Pluraj malkreskoj, iom da kresko

STRUKTURO KAJ KONSISTO

La Komitato ne ricevis aliĝpetojn de novaj landaj asocioj (LA). Post la jarfina malfondo de Slovakia E-Asocio, UEA havis 54 aliĝintajn LA-ojn. Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF) fariĝis la naŭa aliĝinta faka asocio (FA). Novaj kunlaborantaj FA-oj estas Asocio de Verduloj Esperantistaj kaj Eŭropa Klubo. Nuliĝis la kontrakto kun Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj pro ties malkutiĝo, tiel ke la kunlaboran statuson havis jarfine 33 asocioj.

La nombro de individuaj membroj (IM) malkreskis, sed por la oka sinsekva jaro superis 7000. Estis sume 7027 IM en 120 landoj (1993: 7283 en 115 landoj). Ili konsistis el 451 Membroj (M) kun Gvidlibro, 1366 M kun Jarlibro, 357 Junaj M kun Jarlibro, 3562 M-Abonantoj, 327 Junaj M-Abonantoj, 892 Dumvivaj M, 18 Junaj Dumvivaj M kaj 54 Honoraj M. Laŭlanda statistiko aperis en marto (p. 46.).

Malgraŭ la malkresko de IM-oj per 3,5%, la enspezoj pro tiuj kotizoj kreskis 2,2% (de 335 206 gld. al 342 657 gld.), ĉefe dank' al kurz-evoluo kiu ĉi-foje favoris la valuton de kelkaj landoj kun multe da IM-oj.

La nombro de aligitaj membroj (AM) plu falis ĝis 14 495 (16 041 en 1993), el kiuj 2991 (3498) estis AM-oj de TEJO. Draste malmultiĝis tiuj por kiuj la asocioj en eks-socialismaj landoj pretas aŭ kapablas pagi AM-kotizon: tial la nombro de AM-oj nun estas sur la nivelo de la 50-aj jaroj.

En la 9-persona Honora Patrona Komitato ne estis ŝanĝoj. Kiel novajn Honorajn Membrojn la Komitato distingis Ada Fighiera-Sikorska (Italio) kaj Raymond Gonin (Francio). Forpasis la Honoraj Membroj Emilija Lapenna, Reto Rossetti kaj Betty Salt.

Fine de la jaro la CO realigis intensan varbadon por Societo Zamenhof, rezultontan en grandega kresko de ties membroj en 1995. La kampanjo tamen iom efikis jam en 1994: 156 esperantistoj aliĝis al tiu subtena kategorio (145 en 1993). Ili ricevis du cirkulerojn de la prezidanto kaj inviton al speciala akcepto en la Seula UK.

La delegitaro de la Jarlibro 1994 konsistis el 2182 individuoj en 86 landoj (1993: 2272 en 87 landoj). Estis 1134 (lokaj) delegitoj, 165 vicdelegitoj, 80 junularaj kaj 1570 fakaj delegitoj. En 43 landoj funkciis ĉefdelegito, krome en Brazilo eksperimente 4 regionaj delegitoj. Plu daŭris la diskuto

pri nova regularo pri delegitoj, verŝajne akceptota en la UK en Tampere.

GVIDORGANOJ

Membrolisto de la Komitato aperis en la Jarlibro 1994 (p. 13-17). Poste aldoniĝis komitatano A por IKEF, tiel ke fine de 1994 la Komitato konsistis el 83 membroj: 61 A, 8 B kaj 14 C. Estis krome 7 observantoj. La kunsidojn dum la Seula UK (vd. sept. p. 144) partoprenis 52 komitatanoj aŭ anstataŭantoj, kiuj i.a. aprobis Komitatan Regularon preparitan dum tri jaroj.

En marto demisiis el la Estraro Ian Jackson, la ĝenerala sekretario. Kiel lia posteulo elektiĝis en Seulo Mark Fettes. Dum sia lasta mandatjaro la Estraro sekve havas 6 membrojn. Ilia adresaro aperas i.a. en la kolofono de ĉiu nia numero. La Estraro kunsidis en Roterdamo fine de marto (majo, p. 81) kaj dum la UK en Seulo.

En Seulo kreiĝis du novaj komisionoj: pri amerika agado kaj pri la azia Esperanto-movado (vd. “Regiona agado”, p. 112). Anstataŭ komisiito pri familiaj aferoj ekfunkciis la komisiono Rondo Familia (sept., p. 156). Ĝisdata listo de komisiitoj kaj komisionoj aperis en la Jarlibro, p. 22.

Vasta taskaro efike mastrita

PERSONARO

En la stabo de la Centra Oficejo (Jarlibro 1994, p. 19) ne okazis ŝanĝoj. Entute laboris 12 oficistoj, el kiuj 3 partatempaj, tiel ke la laborforto egalas al 10,4 plentempaj dungitoj. Malgraŭ la laŭgrada reduktiĝo de la stabo (de 11,9 plentempuloj en 1983), la taskaro de la CO emis daŭre plivastiĝi kaj tamen restis plenumbla, ĉefe dank' al stabileco de la oficistaro kaj aŭtomatigo.

La Volontula Servo ne estis utiligebla tiom kiom dezirinde. Kandidatoj ne mankis, sed ja mankis loĝiga eblo kaj sufiĉa subten-kapablo de la Volontula Fondaĵo, kies kapitalo ĝis nun atingis nur trionon de la origine celitaj 200 000 gld. Krom regula helpo de du lokaj esperantistoj por la biblioteko kaj prizorgado de la oficeja domo, la CO profitis de la laboro de tri aliaj volontuloj dum entute 16 semajnoj. Krome ekde oktobro ĝis la fino de marto 1995 laboris voluntulino por TEJO.

EKIPAĴOJ

Krom anstataŭigo de du terminaloj kaj aliaj komputilaj partoj, gravaj aĉetoj ne okazis. Rimarkindajn ekstrajn kostojn tamen kaŭzis la paneo de la ĉefa komputilo, kiu ne eltenis la escepte varman veteron fine de julio. Preskaŭ tri semajnojn la komputilo ne estis uzebla kaj ankoraŭ en septembro nur lame funkciis, kio tre ĝenis ĉiujn laborojn de la oficejo.

En decembro la CO akiris rektan retpoŝtan ligon (adreso: uea@inter.nl.net), anstataŭ la komplika retkonekto pere de Universitato Erasmus pri kiu la CO disponis ekde aprilo 1992. Antaŭ la nova aranĝo la uzo de la retpoŝto estis tre limigita. Ĝi tamen multe plifaciligis kontaktojn kun kelkaj landoj kun malbonaj poŝtaj servoj.

SERVOJ

La Jarlibro aperis komence de junio. Ĝi havis 304 paĝojn, t.e. 16 malpli ol en 1993, ĉefe pro la malpli alta nombro de delegitoj. La unuaj 96 paĝoj aperis kiel aparta depresaĵo, *Gvidlibro tra la Esperanto-movado*. Enpaĝigaj aranĝoj ebligis enmeti informojn pri multaj asocioj kaj institucioj kiuj

antaŭe ne estis inkluzivitaj. Landaj Asocioj unufoje povis mendi aperigon de mapo de sia lando kontraŭ rabatita prezo. Tion faris Esperanto-Asocio de Finnlando, Unuiĝo Franca por Esperanto (du mapoj) kaj Germana Esperanto-Asocio. La kostoj de la Jarlibro sumiĝis je 28 590 gld., t.e. 2 500 gld. malpli ol en 1993, pro malpli altaj preskostoj kaj pli da anonc-enspezoj.

La Libroservo sukcesis pligrandigi sian debiton post kelkajara ŝrumpado. La vendoj sumiĝis je 248 440 gld. (1993: 240 073 gld.) kaj la peritaj gazet-abonoj je 4 369 gld. (6 165 gld.). Post subtraho de la aĉetoj la neta rezulto de la libroservo estis 97 203 gld. (86 131 gld.). Analizo de la vendoj, kun statistiko de la plej furoraj varoj, aperis en marto (p. 55).

En januaro eliris nova, 160-paĝa katalogo kun 3300 eroj. Ĝin ricevis senpage la dumvivaj membroj kaj membro-abonantoj, plus la regulaj klientoj de la Libroservo. Aliaj povas aĉeti ĝin por 9 gld. La katalogo estas konsultebla ankaŭ en la komputila reto. Aperis krome tri listoj de brokantaĵoj por ĉ. 100-kapa klientaro. La Libroservo cirkuleris du specialajn ofertojn, ambaŭ tre sukcesajn: por la delegitoj, kaj por la kvar landoj kiuj kandidatis por aliĝo al Eŭropa Unio.

Tre bona por la Libroservo estis ankaŭ la Malferma Tago, al kiu la Centra Oficejo invitis nederlandajn esperantistojn la 26-an de novembro. Okdedo da vizitantoj konatiĝis kun la CO kaj ties laborantaro.

Pro konscia politiko de la Estraro, la Eldona Fakto plu bremsis sian aktivadon. Krom represo de *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo* de Tibor Sekelj en decembro, ne aperis novaj libroj. Sekve malkreskis la vendoj de propraj eldonaĵoj, kiuj atingis 33 998 gld. (1993: 39 543 gld.) kaj donis netan profiton de 9 834 gld. (11 330 gld.). Kelkaj titoloj estis preparataj por eldono en 1995.

Al la servoj apartenas ankaŭ la administrado de UEA-kontoj: notindas ke en 1994 rimarkeble kreskis la uzo de ĉi tiu oportuna movada pagrimedo.

Daŭra strebo produktas bonan rezulton

En junio 1994 (p. 101) aperis trafa frazo pri la financa stato de UEA: "Ĝi fartas pli bone ol antaŭe, sed ĝi devus farti ankoraŭ pli bone." Ni povus preni tiun frazon kiel karakterizon de la tuta financa jaro 1994.

Tio estas konstatebla el la Spezo-konto kaj Bilanco, kiuj aperas sur p. 115-116. Io alia tamen ne facile konstatablas el tiuj financaj dokumentoj — la vojo kiu kondukis al la ciferoj tie prezentitaj. Ne estas tiel ke la oficistoj kaj estraranoj sidas kaj atendas por vidi kiel saldiĝas la jaro. Daŭra gardostaro super la diversaj evoluoj, tuja tranĉo de elspezoj kiam la rimedoj ne realiĝas, zorga ŝparado, rapida interveno en la kazo de surprizoj, senĉesa serĉado kaj varbado de novaj rimedoj... La financa jaro de UEA estas sufiĉe drameca, kaj ĝi konsistas el konstanta batalo por atingi la rezulton buĝetitan (aŭ pli bonan).

Dum la pasinta jaro oni ne malofte povis legi tra la movada gazetaro alarmajn informojn pri la financo de UEA. Ili estas malĝustaj kaj senbazaj. Aliflanke eĉ tiaj informoj havas sian pozitivan flankon, ĉar ili instigas al daŭra atento kaj reekzameno de la financa politiko en la Asocio. Ne eblas sukcese apliki al UEA unuecan ekonomian teorion, kiel ajn genie ĝi aspektus, ĉar UEA estas samtempe internacia kultura organizaĵo kaj komerca firmao. Kun la membraro en 120 landoj, UEA restas finance sentema al la evoluoj en la tuta mondo, kaj ĝi apenaŭ povas finance farti pli bone ol la mondo mem. Ŝajnas, tamen, ke ĝi en 1994 sukcesis fari ĝuste tion.

SPEZOKONTO

La kostoj estis je 13 000 kaj la rimedoj je 12 000 gld. malpli altaj ol buĝetite. Tio produktis negativan saldon de 37 237, anstataŭ la buĝetitaj 38 100 gld. La rezulto do atentas ankaŭ la komitatan decidon pri laŭgrada malaltigo de la negativaj saldoj (9000 malpli ol en 1993). En la lastaj kvin jaroj la negativa saldo laŭgrade malkreskis je pli ol 50%.

Ĉe la kostoj okazis signifaj ŝparoj en la ĉapitroj: Centra Oficejo — 2000, Oficeja Domo — 3000, Revuo — 9000, Jarlibro — 8500, Kontakto — 1000, Vojaĝkostoj — 3000 kaj Ĝeneralaj Kostoj — 4000 gld. Tamen la buĝetitaj kostoj estis superitaj en la ĉapitroj: Salajroj — 8000 (grandparte pro la unuafoja kontribuo al la pensia rezervo), Movada Evoluigo — 1000 kaj Amortizoj — 8000 gld.

Ĉe la rimedoj negative surprizis la ĉapitroj: Kotizoj — 16 000, Libroservo — 1000, Eldona Fakto — 6500, Servoj — 14 500 kaj Rento — 4000 gld. La efikon de tio iom mildigis bonaj evoluoj en la ĉapitroj: Kompensoj — 9500, Kongresoj kaj Turismo — 13 000 kaj Donacoj — 7500 gld. Sed denove, oni el tio ne vidas la dramecon de la evoluoj, ĉar en 1993 la Spezokonto ricevis 41 000 gld. da rento pli ol ĝi enspezis en 1994. Tion kaŭzis parte la ĝenerala rentofalo en 1994, sed tamen ĉefe la decido meti nete ĉ. 21 000 gld. de la rento en la Kapitalon Dumvivaj Membroj. Sen tiu nova destino de la rento, sen la kontribuo al la pensia rezervo, kaj kun pli modera amortiz-politiko — la Spezokonto sumiĝus preskaŭ per pozitiva saldo.

BILANCO

Kiel ajn oni ekzamenas la Bilancon je la 31-a de decembro 1994, oni venas al pozitivaj konkludoj pri la sano de la havaĵoj de UEA. En la lastaj dek jaroj la bilanca valoro de la Asocio kreskis de 2,3 milionoj en 1984 al 4,4 milionoj da guldenoj en 1994.

En la lastaj kvin jaroj okazis pluraj pozitivaj evoluoj ĉe la Aktivoj: La valoro de la Domo estis deskribita je sume 32%, kvankam okazis pluraj plibonigoj de la Domo. Malkreskis ankaŭ la valoro de la maŝinoj je 43%, kvankam ni nun havas modernan,

novan maŝinaron. Malkreskis blokitaĵoj monrimedoj je 88% kaj “debitoroj” je 19%; kreskis valorpapiroj je 8% kaj stokoj je 9%, dum la rimedoj en la bankaj kontoj kaj deponoj eksplode altigis je 115%.

En la sama kvinjara daŭro ankaŭ en la flanko de la Pasivoj okazis gravaj ŝanĝoj, ĉefe pozitivaj: Unuavide la Kapitalo malkreskis je 11%, sed tio okazis pro la granda deskribo en la valoro de la Domo (113 000 gld. en

FONDAĴOJ


La evoluo de la fondaĵoj en 1994 estis ĝenerale pozitiva, kvankam ilia suma valoro malkreskis je 5% kompare kun la antaŭa jaro. Tiu malkresko okazis ĉefe en Fondaĵo Azio, pro la venigo de deko da aziaj aktivuloj al la 79-a UK en Seulo (unika tiucela okazo), sed parte ankaŭ pro la granda falo en la valoro de usona dolaro, kiu restas la valuto de Fondaĵo Grabowski. Ĉiuj aliaj fondaĵoj, krom Fondaĵo

Wüster, kreskis. La falo ĉe Biblioteka Fondaĵo estas ŝajna, ĉar temas pri prunto por aĉeti gravan bibliotekan kolekton, repagota per parto de la rimedoj kiujn generos en 1995 la brokante vendota parto de tiu kolekto mem. Grava plibonigo estas notinda en Propaganda Konto, kiu antaŭ nur du jaroj havis negativan saldon. Belarta Fondaĵo enprenis la rimedojn de la antaŭa Fondaĵo Kantoj. Malgraŭ ĉio ĉi pluraj fondaĵoj estas ankoraŭ malproksime de siaj kapitalaj celoj (Afriko, Ameriko, Triamonda, Volontula), kaj necesas daŭrigi la strebojn trovi pliajn rimedojn por ili.

INSTITUCIO HODLER

En 1994 Institucio Hodler '68 (IH) disponigis subvenciojn de 7500 gld. al diversaj movadaj instancoj kaj projektoj. Temis tamen pri la disponigo de parto de pozitiva saldo el 1993. La kontoj

de 1994 ne estis pretaj en la momento de la finredakto de ĉi tiu Raporto, sed la ĝenerala evoluo estas pozitiva, kaj la financo de IH ankaŭ en 1994 plie solidiĝis, tiel ke la rimedoj disponeblaj por subvencioj verŝajne estos pli altaj. Aliflanke necesas atentigi ke la Institucio en la tempo de sia kreiĝo (1968) estis pli-malpli la sola tia instanco en la Esperanto-movado, dum nun ekzistas tuta aro da similaj instancoj ene de UEA kaj ekster ĝi.



“Ne gutas mielo el la ĉielo.” — Ne estas tiel ke la oficistoj kaj estraranoj de UEA sidas kaj atendas por vidi kiel saldiĝas la jaro.

1991). Rezervoj kreskis je 23%, Kapitalo Dumvivaj Membroj je 52%, kvankam nia dumviva membraro en la sama periodo malkreskis je 7%. Niaj fondaĵoj en tiuj kvin jaroj preskaŭ triobligis siajn rimedojn per kresko de 180%, dum “kreditoroj” altigis je 23%. La profesia revizoro taksis la bilancan likidecon (t.e. la laŭnecese rapidan monigeblecon de la rimedoj) de la Asocio pli ol kontentiga.

Pesimistoj malpravis

La 79-a Universala Kongreso okazis en Seulo (Korea Respubliko) de la 23-a ĝis la 30-a de julio 1994. La Kongreso, al kiu aliĝis 1776 kongresanoj el 66 landoj, estis tre bone organizita de sindediĉa teamo de koreaj aktivuloj kaj helpantoj, kun admirindaj kunlaboro kaj apogo ankaŭ de la ŝtataj kaj urbaj aŭtoritatoj. Politikaj perturboj en la korea duoninsulo, precipe en la unua jarduono, eventuale negative influis la nombron de partoprenantoj. La Estraro kaj la CO devis korespondi kun kelkaj pesimistoj, kiuj montriĝis malpravaj.

en la abunda kaj altkvalita arta programo. Ĉar la Kongreso estis la plej granda internacia aranĝo en Koreio dum 1994, ĝi facile vekis grandan intereson en la gazetaro kaj aliaj amaskomunikiloj.

Kun tre variaj ekskursoj, antaŭ- kaj post-kongresaj aranĝoj — ĉio modele organizita kaj populara ĉe la kongresanoj — la 79-a UK estis tuta leciono ke indas kaj nepre valoras pli kuraĝe celi urbojn novajn kaj freŝajn por la estontaj Kongresoj. Tion apogas ankaŭ la surprize bona financa rezulto de la memorinde sukcesa 79-a UK en Seulo.

Ne okazis Infana Kongreseto, sed funkciis improvizita vartejo en la mirinde komforta Seula kongresejo. Bone organizitaj estis ankaŭ la akompanaj aranĝoj: la 50-a Internacia Junulara Kongreso, la ILEI-konferenco, kaj la postkongreso en Japanio, kiun kunlabore organizis Japana Esperanto-Instituto kaj UEA.

La preparoj por la 80-a UK en Tampere evoluis preskaŭ perfekte, disvolvo kiu aŭguras grandan kaj ĝuindan UK en Finnlando.

La Centra Oficejo intense okupiĝis pri la 81-a UK en Prago (1996), kaj ankaŭ tie la preparoj bone marŝas. Definitiviĝis la decido ke la 82-a UK estu en Adelajdo, Aŭstralio (1997). Okazis ankaŭ pluraj sondoj pri la kongresaj landoj kaj urboj en la postaj jaroj.



La 79-a UK en Koreio ricevis pli grandajn dimensiojn ol kelkaj atendis.

Ne nur la kongresa temo — “Azio en la mondo” — stampis azie la Kongreson. Tion faris ankaŭ la fakto ke du trionoj de la partoprenantoj estis aziaj. El 8 IKU-prelegantoj 5 venis el Azio. Ankaŭ en la Esperantologia Konferenco ĉefrolis la gastiganta kontinento, samkiel en aliaj prelegoj kaj

Kontakto sur solida bazo

ESPERANTO

István Ertl redaktis 11 numerojn 24-paĝajn, kiujn komputile kompostis Roy McCoy en la CO. Grafike konsilis Francisco L. Veuthey. Ekde aprilo la revuo aperis tre akurate: ĉiuj numeroj dissendiĝis en la unuaj tagoj de la koncerna monato aŭ pli frue. La enspezoj pro anoncoj, 10 228 gld., ne atingis la buĝetitajn 14 000 gld.

Esperanto regule raportis pri movadaj evoluoj en Orienta Eŭropo, Afriko, Latin-Ameriko kaj Azio. Apartaj artikoloj prezentis la movadon de Albanio, Bulgario, Ĉeĥio, Ĉinio, Kolumbio, Litovio, Moldavio, Sud-Afriko, Togolando, Ukrainio, Uzbekio kaj Vjetnamio.

Unuafoje post pli ol 20 jaroj, la septembra numero temis ne nur pri la UK, sed ankaŭ pri kelkaj aliaj someraj aranĝoj, por eviti “ŝtopiĝon” en oktobro. Alia premiero: du sinsekvaj numeroj portis surkovrile foton pri la

EKSTERAJ RILATOJ KAJ INFORMADO

Laboro sendrama sed grava

En 1994, kiel en antaŭaj jaroj, la Asocio flegis siajn rilatojn precipe kun la duondeko da gravaj interŝtataj organizoj kun kiuj ĝi havas konsultajn rilatojn (Jarlibro, p. 10). En Eŭropo ĝi aparte stimulis kunordigadon de la rilatoj de la landaj asocioj kun eŭropaj interŝtataj instancoj. Per la internacia Ago-Tago ĝi provis atingi similan rezulton sur la kampo de ĝenerala informado, en tutmonda skalo.

UN, UNESKO, UNICEF


En la kvar “ĉefurboj” de UN — Novjorko, Ĝenevo, Vieno kaj Parizo — la komisiitoj de UEA (Jarlibro, p. 22) daŭrigis sian sendraman sed gravan reprezentan laboron. En marto Fettes kunvokis kunsidon de aktivuloj en Parizo (majo, p. 82), sekve de simila

Ĝustigo

Sur la kovrilo de nia aprila numero kaj sur ties p. 61, la viro staranta maldekstre de Fernando de Diego ne estas lia frato Óscar de Diego, sed la venezuela esperantisto David Villasmil.

Jen la vera Óscar de Diego: maldekstre, tostante je familia festo kun sia frato Fernando.

Ni pardonpetas de la koncernatoj.



sama persono — Nobel-premiito Reinhard Selten, kiun la redaktoro kaj estrarano Lins intervjuis (dec.). Aliaj intervjuoj de la jaro estis i.a. Sylla Chaves, György Nanovszky kaj Giorgio Silfer (dufoje).

“Nodoj de nia historio” titoliĝis separta serio de Árpád Rátkai (ekde dec. '93). Ampleksaj tekstoj markis la 100-jaran jubileon de Raymond Schwartz (apr.), la 90-jariĝon de Bakin (okt.-nov.) kaj la 40-an datrevenon de la Montevidea rezolucio de Unesko (dec.). Aparte longaj artikoloj rememoris pri la forpasintaj Ĵelezo (majo) kaj Reto Rossetti (nov.).

Kompare al 1993, malpliĝis la recenzoj: 34 libroj estis traktitaj sur 17 paĝoj (1993: 57, 21). La rubriko “Laste aperis” listigis freŝajn titolojn sur 8 paĝoj. Kvin E-revuoj prezentiĝis detale en la rubriko “La diligenta kolegaro”. La legantoj rekte aŭdigis sian voĉon en “Reagoj” (33 leteroj sur 6 paĝoj) kaj “Forumo” (8 artikoloj, plejparte tutpaĝaj, pri ĝeneralaj E-rilataj temoj).

Ĉiu numero strebis al tema varieco,

kunsido en Novjorko la antaŭan jaron. Kvankam prezentiĝas multaj kaptindaj okazoj, ĉie malsufiĉas la laborfortoj — speciale de homoj kun diplomatia talento kaj la tempo necesa por frekventi kunvenojn. Interesitoj bonvolu kontakti la estraron pri eksteraj rilatoj.

La plej elstara iniciato de la jaro estis la scienca simpozio organizita de Zlatko Tišljarić en Graz (Aŭstrio), kadre de la Internacia Jaro de Familio (sept., p. 156). Kun aŭspicioj de UEA, de UN, plus de lokaj kaj regionaj instancoj, la simpozio produktis valoran materialon pri la temo “Internacia Familio: Ĉu utopio aŭ realaĵo?”. En la oficialaj konkludoj kaj rekomendoj, senditaj al UN, la partoprenantoj aparte atentigis pri la signifo de Esperanto-familioj por edukado al kompreno kaj respekto de aliaj kulturoj.

Malgraŭ provo de UEA kunlabori kun “Esperanto” Radikala Asocio pri la projekto Fundapax (majo, p. 82), por kiu ERA petis kaj ricevis subvencion de la Partopren-Programo de

Kontakto estas unu el la grafike plej altnivelaj Esperanto-gazetoj.

kaj tial ne aperis “specialaj sekcioj”, krom pri la kongreslando, Koreio (jan.). En oktobro la revuo ĉerpis ĉapitron el la aperonta Esperanta traduko de *La serĉado de perfekta lingvo* de Umberto Eco.

KONTAKTO

La sociokultura revuo *Kontakto* de TEJO, eldonata de UEA, aperis en 6 numeroj, sub la redakto de Francisco L. Veuthey. Grafike ĝi daŭre estas unu el la plej altnivelaj Esperanto-gazetoj. Redakte ĝi sukcesis kontentigi plenumi la celon samtempe servi al junularo kaj al diversaj lernantoj de la

lingvo. Tio ebligis ke la 35%-a plialtigo de la abonprezo ne influis negative la abonojn. *Kontakto* retenis la nombron de simplaj abonoj, dum tiu de kolektivaj preskaŭ triobliĝis, dank’ al grandaj abonoj de Kataluna E-Asocio kaj Fondaĵo Afriko. Estis 462 abonoj simplaj (461 en 1993) kaj 601 kolektivaj (214). Plimultiĝis ankaŭ la Patronoj de TEJO (de 74 en 1993 al 91 en 1994), el kies kotizoj 25% enspeziĝas al *Kontakto*. La revuon krome ricevis 12 Dumvivaj Patronoj kaj 702 individuaj membroj de TEJO. La granda kresko de la enspezoj resanigis la financon bazon de *Kontakto*.

Unesko, ties planado kaj kunordigado restis plene ekster la strukturo de UEA.

EŬROPO

Agadkomitato por Federacia Eŭropa Lingvopolitiko (AFEL), kreita en 1993 laŭ iniciato de UEA, kun la celo kunordigi la agadojn de unuopaj landaj asocioj, Eŭropa Esperanto-Unio, diversaj esperantistaj laborgrupoj, kaj interesitaj ekstermovadaj organizaĵoj, ekhavis regulan rubrikon en la bulteno *Eŭropa Esperantisto*. Kunsidoj en Budapeŝto kaj Seulo pridiskutis pluajn praktikajn agadpaŝojn, kiuj poste eniris proponon de komuna laborplano, dissendita al la landaj asocioj en 1995.

Interŝanĝo de leteroj kun Konsilio de Eŭropo kondukis al la nomumo de du novaj komisiitoj (Jarlibro, p. 22), kiuj ekserĉis manierojn aktive kunlabori sur la terenoj de lingvo-instruado kaj lingvaj rajtoj.

En Belgio, Britio, Francio kaj Germanio oni utilis la balotojn por la Eŭropa Parlamento por atentigi la kandidatojn per alvokoj aŭ demandoj pri la lingva problemo en EU

kaj pri Esperanto (marto, p. 41; jun., p. 102; jul.-aŭg., p. 127). La laborgrupo pri komunikado en EU dissendis al la elektitaj eŭro-parlamentanoj resumon pri la simpozio pri la eŭropa lingvoproblemo, okazinta en Bruselo en 1993. (Pri la strategio de la laborgrupo vd. jun., p.104-105.)

INFORMA FAKO

Ne aperis la bulteno *Influo*, pro manko provizora de redaktoro. István Ertl dissendis kvin cirkulerojn al inform-aktivuloj, pri: nacilingvaj tradukoj de *La serĉado de perfekta lingvo* de U. Eco (marto), la paska saluto E-lingva de la papo kaj la nova sekretario de Konsilio de Eŭropo (aprilo), la Ago-Tago (septembro), la Nobel-premio de Reinhard Selten, kaj la eventuala uzo de Esperanto en videofilmo de Michael Jackson (jarfine). La enlanda informado pri la 79-a UK estis kontentiga; la eksterlanda servo funkciis malpli efike. En oktobro UEA aŭspiciis la internacian Ago-Tagon, kaj aktivuloj en dudeko da landoj poste raportis pri sia agado sur la paĝoj de *Esperanto* (dec., p. 201).

Kulminis azia agado

AFRIKO

(Respondeca estrarano: Hans Bakker)

Rilate la ĝeneralan evoluon de Esperanto en kontinento kiu daŭre suferadas militon, malsaton, senlaborecon, la frazoj en ĉi tiu jaro povus esti egalaj al la Estrara Raporto pri 1993. Spite ĉion ĉi, esperantistoj plu agadas, instruas, korespondas, kongresas. Kongresoj okazis en Togolando kaj Tanzanio, kaj iusence en Madagaskaro. La Tria Afrika Kongreso (TAK), aranĝita kun helpo de Fondaĵo Cigno, jarfine allogis 48 partoprenantojn el diversaj afrikaj landoj (i.a. Tanzanio) kaj el Eŭropo (8 landoj). (Vd. marto '95, p. 41). Pro la neceso ŝpari, nur unu numero de *Esperanto en Afriko* aperis, sed startis aliaj bultenoj: *Junu-lara Magazino Togolanda* kaj *Ondo da Vero* (ambaŭ togolandaj), dum *La Afrika Reto* interligis la verkemulojn. En TAK okazis A kaj C-seminarioj pri la Cseh-metodo, kaj UEA/ILEI-ekzamenoj je niveloj elementa kaj meza. Elementa ekzameno de UEA/ILEI surprogramis ankaŭ en la Dua Togolanda E-Kongreso (nov., p. 183).

AMERIKO

(Komisiito: Atilio Orellana Rojas; komisiono kreita en la 79-a UK)

La komisiito pri Ameriko okupiĝis pri plivastigo de kunlaboro inter la landaj movadoj de la kontinento. Tiucele okazis ankaŭ speciala kunsido en la UK (apr. '95, p. 64). Kostarikaj esperantistoj lanĉis proponon de centra-amerika konferenco, nun planata por februaro 1996.

Brazila Esperanto-Ligo ricevis donace terenon en satelita urbo de la ĉefurbo Brasília. BEL planas konstrui tie domon, kiu provizos sidejon por BEL kaj eventuale aliaj E-organizaĵoj. La tutlanda gazeto *Brazila Heroldo*, fondita en 1993, ŝajnas sukcese enradikiĝi. Tiu profesiece farata gazeto ne premeritas ankaŭ internacian atenton. Komuna kunsido de la estraroj de la du landaj asocioj en Argentino akcelis la procezon de ilia unuiĝo, kiun ekigis persona vizito de la prezidanto de UEA en 1992. En januaro okazis la unua renkontiĝo de boliviaj esperantistoj (marto, p. 47).

Fondaĵo Ameriko de UEA daŭre kreskas malrapide kaj restas malproksime de la nivelo kiu necesas por ekplenumi la celon: subvencii la movadon en Latina Ameriko.

Latina Ameriko meritas pli da movada atento. Philippe Chavignon (dekstre) ne hezitis gvidi Cseh-kurson en sukerkana kampo de Kolombio.



AZIO

(Respondeca estrarano: So Gilsu; komisiono kreita en la 79-a UK)

La Universala Kongreso de Seulo estis la tria UK en Azio. Ĝi estis la plej azia el ĉiuj, ĉar du trionoj el la partoprenantoj venis el landoj de tiu kontinento. Granda plimulto el ili estis koreoj kaj japanoj, sed reprezentigis multaj aliaj aziaj landoj, pruvante la grandan kreskon de la movado en Azio, precipe dum la lasta deko da jaroj. Tiu krĉsko apenaŭ eblus sen la granda financa subteno de Fondaĵo Azio — kiu ricevas siajn rimedojn el la rento de Kapitalo Azio — kaj sen la donacoj de multaj mecenatoj, precipe japanaj. Lige kun la UK kulminis la ĝisnuna azia agado de UEA en formo de karavano, kiu venigis naŭ esperantistojn el Ĉinio, Hinda Unio, Kamboĝo, Mongolio, Nepalo, Rusio, Uzbekio kaj Vjetnamio al la UK kaj poste kvar el ili al Japanio. La karavanon helpis donace 166 japanaj esperantistoj aŭ kluboj. (Vd. apr. '95, p. 67; detala raporto aperis en *Esperanto en Azio*, n-ro 18.)

Fondaĵo Azio subtenis la eldonon de mongola kaj vjetnama lernolibroj de Esperanto kaj instruan agadon de Atilio Orellana Rojas en Koreio. Aperis tri numeroj de la bulteno *Esperanto en Azio*, redaktata de ges-roj Doi el Japanio.

EŬROPO

(Respondeca estrarano: Ulrich Lins)

Lins havis okazon renkontiĝi kun gvidantoj de landaj asocioj kaj kun aliaj e-istoj lige kun siaj vojaĝoj al Ĉeĥio, Hispanio, Kroatio, Latvio, Portugalio, Rumanio, Ruslando kaj Slovenio. En eks-socialismaj landoj li konstatis, diference de siaj antaŭaj vizitoj, multe pli optimisman atmosferon malgraŭ la ade premaj cirkonstancoj ekonomiaj. Tre pozitiva evento estis la reunuiĝo de la movado en Ruslando, kie Rusia E-ista Unio ekde novembro estas la sola tutlanda asocio (dec., p. 205). Alispeca unuiĝo okazis en Nederlando. Malfondiĝis kaj la landa asocio de UEA kaj la laborista asocio, kiujn anstataŭas Esperanto Nederland, fondita en septembro. Aperis la unuaj signoj de revigliĝo de la landaj asocioj de Pollando (jan. '95, p. 6) kaj Kroatio (vd. samloke). Sentebla bato estis la malfondo de Slovakia E-Asocio (apr. '95, p. 68). Tuj tamen komenciĝis preparoj por starigo de nova asocio, eventuale jam en 1995.

Milo da mendoj por Mazi

Laŭ kontrakto inter UEA kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, farita en 1991, pri la instrua agado de UEA respondecas ILEI. Tial en la Estraro de UEA ne estas respondeculo pri instruado, sed observanto de ILEI ĉeestas la kunsidojn. Tiu aranĝo tamen ne estas strategie pravigebla: en la praktiko ĝi tro distancigis UEA disde la instrua kampo kaj kaŭzis neglekton de iuj agadoj kiuj ja rilatas al instruado, sed falas ekster la kutiman agadkampon de ILEI. Estas dezirinde ke en la nova Estraro, elektota en Tampere, estu denove kompetentulo taskita pri instruado.

La Internaciaj Ekzamenoj de UEA kaj ILEI proponas eblon de ekzameniĝo precipe al esperantistoj el landoj sen propra ekzamen-strukturo. En 1994 okazis 12 sesioj en 9 landoj kun 87 kandidatoj (48 por la elementa kaj 39 por la meza niveloj), el kiuj

sukcesis 74 (po 37 en ambaŭ). Pretiĝis la regularo por la supera grado, sed por unuafoje okazigi la superan ekzamenon necesas ankoraŭ kompletigi la prezidantaron por ĝi.



La ILEI-konferencanoj staris en Koreio sub alta protektanto.

Per la fonda de landa sekcio en Ruslando, la nombro de ILEI-sekcioj kreskis al 36. ILEI krome havas repre-

zentantojn en 17 aliaj landoj. La konferenco de ILEI okazis tuj post la UK ĉe la Universitato Kangnam, kiu disponigis ĉiujn necesojn (okt., p. 171). Krom al la temo "La aziaj edukado kaj kulturo", la 50 konferencanoj dediĉis specifan atenton al

korespondaj kursoj kaj al instruado de difinitaj aĝ-grupoj. La agadon de ILEI grave bremsis manko de financaj rimedoj, pro kio ekz. okazis neniu instruista trejnkurso. Eldoniĝis tamen tria kajero de la lernolibro *Tendaraj tagoj* kaj *Kunvojaĝu*, lernolibro por plenkreskuloj.

La plej elstara agado en 1994 sur la kampo de instruado disvolviĝis ĉirkaŭ *Mazi en Gondolando*, vidbend-kursa projekto de Internacia Esperanto-Instituto. IEI realigis antaŭmendan kampanjon, kiu ĝis la jarfino arigis pli ol mil mendojn por tiu kurso, laŭplane lanĉota en la UK en Tampere.

KULTURO

Ne direkti, sed varti

Kulturo estas tereno kie pli helpas subteno, apogo kaj vartado ol estrado kaj direktado. UEA ne estras kaj direktas la Esperantan kulturon, ĉar tiun kunkreas centoj da subtenindaj, apogindaj kaj vartindaj agantoj. Sed tre multo en la Esperanta kulturo ne estus imagebla sen la eblaro kiun UEA certigas: daŭra katalogado kaj vendado de E-eldonaĵoj; du revuoj kiel ĉies forumo; Belartaj Konkursoj; fondaĵoj kaj premioj; la Universala Kongreso mem ...

PREMIOJ KAJ EVENTOJ

Belartaj Konkursoj en 1994 (sept., p.147) malbone fartis, kvante kaj kvalite: 57 konkursaĵoj estas escepte malriĉa rikolto! Neniu poemo ricevis premion, kaj ankaŭ la unua proza premio restis "en la poŝo de la ĵurio". La duan kaj trian enkasigis la konkursa veterano Georgo Kamaĉo (Hispanio). La branĉojn "Kanto" kaj "Vidbendo"

plagis nepartoprenemo. Viglis almenaŭ la teatra ĝenro, kie Paul Gubbins (Britio) alproprigis ĉiujn trofeojn. Ni ne restis sen Nova Talento, dank' al la prozo de Giuseppe Spini (Italio).

La ĉefajn premiojn de Fondaĵo Gradowski (jan. '95, p. 11) ricevis la rusiaj eldonejoj Impeto kaj Sezonoj. Krome premiĝis revuoj: la franca *Rok-gazet'*, kaj la ĉinaj *Penseo* kaj *Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj*. La Premio Deguĉi estis atribuita al la multflanka verkisto kaj aktivulo Claude Piron.

Laŭ iama iniciato de Spomenka Ŝtimec, la UK denove enhavis Tagon de la Libro, kiun kompletigis "aŭtoraj duonhoroj", bedaŭrinde malmulte vizititaj (sept., p. 146).

Guste Ŝtimec transprenis en Aalen (Germanio) unu el la du premioj de FAME-Fondaĵo, pro siaj verkado kaj multjara aktivado ĉe Internacia Kultura Servo. La alia distingito estis la gazeto *Heroldo de Esperanto*, pro

preskaŭ 75-jara kontribuado al la Esperanta kulturo.

La OSIEK-premion, ĉiam aljuĝatan al nebeletra verko, ricevis *Esperanta bildvortaro* de Rüdiger Eichholz.

ELDONADO

La Eldona Fako de UEA produktis unusolan represon, *Kumeŝaŭa, la filo de la ĝangalo*, kaj ĉe Fondaĵo Afriko aperis la rakonto *Kaj kio poste?* de Gbeglo Koffi. Rilate eldonaĵojn de aliaj, vidu la recenzojn kaj la konstantan rubrikon "Laste aperis". Laŭ ĉi tiu UEA en 1994 ekvendis 189 presitajn kaj 16 aliajn varojn, pli ol en la antaŭa jaro (138 + 11).

Ni menciuj tamen — riskante esti maljusta al la ceteraj — la aparte aktivajn eldonejojn Pro Esperanto (Vieno, beletro kaj instruado), MZ-Verlag (Germanio, sciencpopularigo) kaj Flandra E-Ligo. Notindas ke en 1994 publikigis antologion de la Esperanta scienc-fikcio, *La lingua fantastica* en la itala (jun., p. 112), *La monto* de I. Nemere en la rusa kaj *La nova realismo* de B. Vogelmann albane.

Pli da UN-atento al CED

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (CED)

Komence de 1994 la 12-a Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado, organizita de CED kun la Fako de Konferencaj Servoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj (Novjorko), temis pri "Lingvo kaj internacia komunikado en 'Tagordo por la Paco'". Pro la januara dato, anstataŭ la tradicia decembra, la tuta aranĝo povis okazi en la UN-domo mem, kaj pli abunde partoprenis ofi-
cistoj kaj diplomatoj (marto, p. 44).

La 17-a Esperantologia Konferenco de CED pritraktis la temon "Esperanto el azia rigardo" (okt., p. 165).

La revuo *Language Problems and Language Planning (LPLP)* (vd. dec., p. 213), kies redaktadon prizorgas CED, aperis regule, en tri numeroj, ĉe la eldonejo Benjamins (Amsterdamo).

Du duoblaj numeroj de *Informilo por Interlingvistoj*, kiu raportas pri eventoj kaj eldonaĵoj interlingvistikaj, estis redaktitaj de Detlev Blanke.

ESPERANTO-DOKUMENTOJ

En 1994 subskribiĝis interkonsento inter UEA kaj ELNA, laŭ kiu ELNA transprenas la eldonadon de la angla-lingva serio ekde numero 43A. Ĉe UEA aperis n-ro 42A, traduko de la eseo de

Claude Piron *Psikologiaj reagoj al Esperanto* (26E). Eliris ankaŭ n-ro 32E, *Esperanto kaj la estonteca plurlingvismo: Diskuto kun Umberto Eco*, de István Ertl kaj François Lo Jacomo. (La originala franclingva intervjuo aperis samjare en *LPLP*, vol. 18, nr. 2, p. 87-112).

BIBLIOTEKO HODLER

Ĉiam pli urĝa fariĝas la reorganizado de la biblioteko de UEA. Pro la senĉesa akumuliĝo de novaj titoloj la nuna aranĝo ne plu taŭgas, nek por fizika konservado nek por esplorado. Pri tio okazis pluraj diskutoj en kaj ekster la Estraro, kaj oni antaŭvidas detale esplori pri eblaj solvoj en 1995.

FAKA AGADO / SCIENCA APLIKADO

Novaj asocioj kaj terminaroj

En la nuna Estraro mankis respondeculo pri faka agado. Post insistaj petoj flanke de fakaj asocioj, precipe la fervojista, la Estraro konsideris komisiitun taskon al unu el siaj membroj. Tio tamen montriĝis neebla pro la neatendita demisio de unu membro. La Estraro komunikis al la elekto-komisiono sian rekomendon ke la Estraro elektota en Tampere denove havu membron kun tiu respondeco.

Por la scienca aplikado funkciis komisiito, d-ro Amri Wandel, kiu okupiĝis ĉefe pri la realigo de studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj lige al Internacia Kongresa Universitato en la Tampere UK.

La tereno de la faka kaj scienca agado en Esperanto estas multflanka kaj komplika, kiel montras simpla trarigardo de la listo de aliĝintaj kaj kunlaborantaj fakaj asocioj sur paĝoj 55-69 de la Jarlibro. Kvankam multaj el tiuj asocioj raportas pri malkresko de membraro kaj manko de junaj aktivuloj, aliaj diskonigas novajn agadojn kaj atingojn.

Monda Turismo transformis sian naŭmonatan Internacian Studumon pri Turismo kaj Kulturo en trijaran lernejon, ĉeestan kaj malĉeestan, dum TEĴA lanĉis trejnkurson pri ĵurnalismo kun pli ol 20 aliĝintoj. Multjara kampanjo de IKUE atingis sian celon: la papo salutis la kredantojn ankaŭ Espe-

rante je pasko (majo, p. 87) kaj ree je Kristnasko. Alia grava evento por IKUE estis aĉeto de propra sidejo en Romo. Krom la tradicie granda fervojista kongreso (Krems, Aŭstrio, kun 401 partoprenantoj; vd. sept., p. 158), elstaris la blindula kongreso en Kislovodsk, Ruslando, kun 123 partoprenantoj (okt., p. 167), kaj la eklezia kongreso de IKUE kaj KELI en la pola Gostyń kun pli ol 200 kredantoj (okt., p. 167).

Daŭre aperas novaj asocioj, kiuj serĉas ankaŭ pli formalan rilaton kun UEA. Ekstas krome iniciatoj el kiuj rezultas ne establita asocio sed malpli strikta formo de kunlaboro, ekz. Rondo Kato kaj Internacia Traduk-Reto.

Terminologia Esperanto-Centro provizore ĉesis aktivi, dum trikapa estraro pesas alternativojn por ĝia estonteco; pri tio diskutos la Komitato en Tampere. TEC-Ĉĥio, sub la gvido de inĝ. Jan Pospíšil, ankoraŭ funkcias. Malgraŭ la manko de kunordigo kaj faka trejnado celitaj de TEC, aperis pluraj terminaroj, inter kiuj plej elstaras la 11-lingva *Ĝenerala leksikono de fervojaj terminoj* de Internacia Fervoja Unuiĝo, eldonita sur kompakta disko. Menciindas ankaŭ *Kemiaj kaj scienc-teknika vortaro* (D. Portmann kaj D. Rogers), *Internacia vortaro de mikrobiologia genetiko* (R.A. Lewin) kaj la tre utila *Deklingva manlibro pri politiko* (S. Maul).

FINAJ VORTOJ

Nigro kaj ruĝo

Se iu legus la ĵus prezentitan jarraporton pri 1994 kun ruĝa kaj nigra kraĵoj en la mano por noti movadajn plusojn kaj minusojn, tiu fine havus antaŭ si strekaron de variaj koloroj. "Pluraj malkreskoj, iom da kresko" — diris unu el la ĉapitro-titoloj (p. 107). Unuflanke, laŭ la sobraj ciferoj de niaj statistikoj, la organizita movado ja malkreskis plu en 1994 — aliflanke, senteble kreskis ĝiaj tutmondeco, oferemo kaj solidaro. (Cetero, en la momento kiam ni verkas ĉi tiujn liniojn, ni antaŭvidas ke en 1995 la individua membraro de UEA ne nur reatingos la nivelon de 1994, sed superos tiun de 1993.)

Tutmondeco, oferemo kaj solidaro estas ja bezonataj kvalitoj en la nuna jardeko de ŝanĝo kaj sango. De post la Jubilea Jaro la kultivantoj de Esperanto povis sperti jen esperon, jen entuziasmon, jen eĉ deprimon pro la evoluoj en la mondo. La mildiĝo de la kontraŭstaro orienta-okcidenta kaj fortiĝo de la antagonismo nord-suda; la internaciigo de ekonomio kaj — malpli — de politiko; la eŭropa unuiĝado; la disetiĝo de elektronikaj kaj aliaj komunikiloj — jen amaso da interinflujaj procezoj kiuj defias nin difini nian pozicion, kvin jarojn antaŭ la jarmilsanĝo.

Por ke la mondo nin komprenu almenaŭ tiom kiom ni komprenas ĝin.

Spezokonto de Universala Esperanto-Asocio por la jaro 1994

(Ĉiuj sumoj estas en nederlandaj guldenoj.)

KOSTOJ

Rezulto 1993	Buĝeto 1994	Rezulto 1994
437142 Salajroj	457000	461225
85079 Socia asekuro	90000	87596
20360 Suplementoj	19750	20927
1301 Kafo, teo, lakto	1500	1486
0 Pensiarango	0	5000
543882 Salajroj ktp, nete	568250	576234
14634 Afranko, nete	17000	16569
4867 Telekomunikiloj	8500	6213
5769 Presaĵoj	7000	6478
9270 Materialoj	8250	5268
4099 Maŝinoj, riparo/prizorgo	5250	8229
1500 Revizoro	1700	1500
416 Administraĵaj kostoj	500	1655
6146 Kopiado	4250	5982
-4400 Kopiado (vendoj)	-2500	-4067
42301 Centra Oficejo, nete	49950	47827
11128 Gaso, elektro	11000	11601
658 Akvo	1000	692
1181 Riparo de la domo	1500	739
8050 Purigado	8000	8017
5825 Asekuro	6250	6015
3499 Impostoj je la domo	3250	2022
-2897 Luo ricevita	-1250	-2555
27444 Oficeja Domo, nete	29750	26531
36790 Preskostoj <i>Esperanto</i>	41000	35970
50619 Afranko/ekspedo	55000	47547
22918 Grafiko	22000	21992
5059 Kovertoj	5000	5090
-11456 Anoncoj	-14000	-10228
103930 Esperanto, nete	109000	100371

20500 Preskostoj Jarlibro	23000	19200
15963 Afranko/ekspedo	19500	16347
6255 Grafiko	6000	6041
1741 Kovertoj	1700	1382
-13317 Anoncoj	-13000	-14379
31142 Jarlibro, nete	37200	28591

11515 Preskostoj <i>Kontakto</i>	12000	12771
6800 Afranko/ekspedo	8500	7151
550 Kovertoj	750	615
9710 Grafiko	8500	8500
12250 Redakto	12500	12500
-531 Anoncoj	-250	-403
40294 Kontakto, nete	42000	41134


4577 Estraro (vojaĝado)	13000	8389
3754 Estraro (korespondado)	4000	1853
3059 Oficistoj (vojaĝado)	3000	1852
3223 Vojaĝado (UK)	7250	12060
14613 Vojaĝoj/Korespondado	27250	24154

2000 Edukado	0	3000
0 Informado	0	762
0 Eksteraj rilatoj	0	0
252 Komisiitoj, vojaĝoj	4000	1701
0 Komisiitoj, korespondado	750	189
2252 Movada evoluigo	4750	5652

2339 Bankokostoj	2500	2900
-3849 Kurziferencoj	500	1040
1918 Reprezentado	3500	2746
2361 Antaŭaj jaroj	0	-3514
-1 Diversaj kostoj	500	13
2768 Ĝeneralaj kostoj	7000	3185

6296 Amortizo, domo	6150	6171
7586 Amortizo, apar./mebloj	5350	6359
1185 Amortizo, telefono	1100	2537
41504 Amortizo, komputiloj	14150	19618
14607 Amortizo, programoj	12200	12462
71178 Amortizo entute	38950	47147

879804 Sumo de la kostoj	914100	900826
---------------------------------------	---------------	---------------



RIMEDOJ

5255	Membroj Gvidlibro	5500	5696
41718	Membroj Jarlibro	49500	42957
256396	Membroj-Abonantoj	272000	262802
11459	Membroj Jarl. (junaj)	11000	10737
20378	Membroj-Abon. (junaj)	23000	20465
36195	Peranto-makleraĵo	38000	36924
371401	Kotizoj, indiv. membroj	399000	379581
18344	Aligitaj membroj	21000	18553
4753	Aligitaj membroj junaj	5000	4398
9736	Abonoj <i>Esperanto</i>	11000	9073
1436	Kolektivaj ab. <i>Esperanto</i>	2000	1412
11791	Abonoj <i>Kontakto</i>	12500	15471
3015	Kolektivaj ab. <i>Kontakto</i>	5000	7466
25194	Societo Zamenhof	27000	27957
4968	Fakaj Organizoj	5000	5795
-36195	Peranto-makleraĵo	-38000	-36924
-7279	Pago al TEJO	-7500	-6930
407164	Kotizoj nete	442000	425852
240073	Vendoj de la Libroservo	300000	248441
-155107	Kosto de varoj venditaj	-204000	-150607
84966	Libroservo, malnete	96000	97834
-5000	Katalogkostoj	-5000	-5000
6165	Abonfako	7500	4369
86131	Libroservo, nete	98500	97203
39543	Vendoj de Eldona Fako	70000	33998
-32677	Aldonoj (novaj libroj)	0	-7179
+8746	Ŝanĝo stokvalora	-48500	-15131
-4282	Tantiemoj k.s.	-5000	-1854
11330	Eldona Fako, nete	16500	9834
54623	Grafikaj servoj, CO	60000	51512
26978	Servoj aliaj	26500	20461
500	Inst. Hodler	500	1500
8163	Kompenso, programado	5000	5000
34207	Kompenso, Dumv. Membroj	34500	43178
25000	Kompenso, Prop. Konto	25000	25000
149471	Servoj kaj Kompensoj	151500	146651
95936	Kotizprocentaĵo 79a UK	105000	100765
11105	Turismo	35000	52277
17141	Donacoj al Ĝen. Kaso	10000	15373
52652	Rento, nete	16000	11741
2454	Aliaj enspezoj	1500	3893
179288	Div. enspezoj entute	167500	184049
833384	Sumo de la rimedoj	876000	863589
46420	Negativa saldo	38100	37237
879804	Sumo de la kostoj	914100	900826

Ekipaĵoj & mebloj	30060	27257
Komputilaj aparatoj	54796	38779
Programaro	43820	37387
Telefonsistemo	10662	5625
en Novjorko	1	1
Maŝinaro ktp	139339	109049
Blokitaĵoj monrimedoj	5384	3683
Akcioj	972675	904096
Obligacioj	338000	215640
Valorpaperoj entute	1310675	1119736
Stokoj libroservaj	208816	204564
Stokoj, Eldona Fako	445655	430524
Presajoj, materialoj k.s.	12054	24871
Provizoj entute	666525	659959
Ricevotaj rimedoj	67475	131078
Antaŭpagitaj kostoj	3588	13255
Debitoroj	306809	191040
Debitoroj ktp entute	377872	335373
Ŝparkontoj kaj deponoj	1240152	1714115
Kurantaj bankokontoj	203113	175590
Kasoj diversaj	4527	7119
Kasoj/bankokontoj entute	1447792	1896824
Sumo de la aktivoj	4256112	4426978

PASIVOJ

Kapitalo	304635	349149
Saldo de spezkonto	-46420	-37237
Kapitalo Azio	520000	473649
Kapitalo, Ĝenerala & Azio	778215	785561
Kapitalo Dumvivaj Membroj	707361	669879
Rezervo, debitoraro	17847	18936
Kongresa Rezervo	70589	75615
Rezervo IJK	27057	25000
Rezervo, emeritaj oficistoj	53600	61150
Aliaj sumoj rezervitaj	77522	70882
Rezervoj entute	246615	251583
Belarta Fondaĵo	116401	129867
Fondaĵo Afriko	2882	44
Fondaĵo Ameriko	19641	21898
Fondaĵo Azio	21452	-864
Fondaĵo Biblioteko	25411	20704
Fondaĵo Canuto	2660	-531
Fondaĵo Grabowski	56821	48961
Fondaĵo Junularo	35617	34747
Fondaĵo Kantoj	15868	-
Fondaĵo Saliko	69117	72251
Fondaĵo Wüster	10051	7169
Konto Espero	20695	23784
Propaganda Konto	27391	34287
Triamonda Kongresa Fondaĵo	63145	65905
Volontula Fondaĵo	65014	67276
Fondaĵoj entute	552166	525498
Antaŭricevitaj rimedoj	153161	144749
Pagotaj kostoj	76087	69105
Pendantaj spezoj	6937	4854
Kreditoroj	1006036	1215354
Deponoj de membroj	729534	760395
Kreditoroj k.s. entute	1971755	2194457
Sumo de la pasivoj	4256112	4426978


Bilanco

de Universala Esperanto-Asocio je la 31-a de decembro 1994

(por komparo aperas ankaŭ la stato fine de 1993)

AKTIVOJ	1993	1994
Domo, Roterdamo	308524	302353
Tereno Aspremont	1	1
Nemoveblaĵoj	308525	302354

Laste aperis



Aventuroj en Esperantujo. Ralph Harry (1917). Sidney: Aŭstralia E-Asocio, 1994. 81p. ISBN 0 646 22173 6. 21cm. Travivaĵoj de diplomato per Esperanto. Bazita sur radio-paroladoj. 10,80 gld.

Bazaj nocioj en kemio kaj kemiaj kalkul-problemoj. Boris Ŝvarc. Gundelfingen: G & M Westermeyer, 1994. 54p. ISBN 3-923596-04-9. 21cm. Ekzercoj por studentoj, kun detalaj solvoj. 9,90 gld.

Dansk-Esperanto ordbog. Elisabeth kaj Harald Grønberg. Odense: Eget, 1949. 387p. 21cm. Bind. Daŭre la plej granda dana-Esperanta vortaro (pli ol 10 mil kapvortoj). 15,00 gld.

Dulingve — pli simple. Ernő Csizsár (1940). Roterdamo: UEA, 1995. 86p. 29cm. La unua libroforma prezento de denaska edukado per du lingvoj el kiuj unu estas Esperanto. 10,50 gld.

Eduko danĝera kaj aliaj teatraĵoj. Harold Brown. Högsby: Ulekso, 1995. 151p. ISBN 91-630-3214-7. 21cm. Dek teatraĵoj — tri jam prezentitaj — pri homoj kiuj "diverskaŭze trovas sin apartigitaj" de la socio. 34,80 gld.

L'ekzakto de l'ombro. Gellu Naum (1915). El la rumana trad. Sasha Vlad. Berkeley: Bero, 1995. 20p. ISBN 1-882251-11-3. 22cm. Poemaro de centra figuro de la rumana surrealisismo. 6,90 gld.

El sisma zono. Mikaelo Gišpling. Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1994. 109p. ISBN 90-71205-56-8. 21cm. Versletoj: poezia atesto pri la nuntempa vivo en eks-Sovetio. 16,80 gld.

Esperanto: Lehrbuch der internationalen Sprache. Zlatko Tišljär k.a. Trad Karl Hirmann k.a. Maribor: Inter-Kulturo, 1995. 65p. 21cm. La Zagreba metodo por germanlingvaj komencantoj. 9,90 gld.

Esperanto: učbenik mednarodnega jezika. Zlatko Tišljär k.a. Trad. B. Levačič. Maribor: Inter-Kulturo, 1993. 42p. 21cm. La Zagreba metodo por slovenlingvaj komencantoj. 9,90 gld.

Historio de finna sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia. Olavi Kantele (1920). Espoo: la aŭtoro, 1994. 70p. ISBN 952-90-5690-7. 21cm. 13,80 gld.

Humanismo. Dimitar Simeonov. Sofio: Bulgara E-Asocio, 1991. 59p. 21cm. Pri "la urĝa neceso scienca esplori la socian realaĵon", por ĝin reformi. 5,10 gld.

Misĝvidaj ĝardenoj de l' sopiro (1993). Sigrun Kramp (1978). El la germana trad. Maja Tišljär. Maribor: Inter-Kulturo, 1994. 55p. ISBN 961-6075-01-2. 21cm. Poemaro de juna aŭstra poetino, pri kiu "la literaturkritiko estis surprizita". 9,90 gld.

Mi volis tuŝi la sunon. Tone Partljič. El la slovena trad. Zlatko Tišljär. Maribor: Inter-Kulturo, 1994. 64p. ISBN 961-6075-03-9.


21cm. Ilus. Serio "Familiaj libroj". Dek noveletoj por infanoj kaj plenkreskuloj. 9,90 gld.

Plena poemaro. 1917-1937. Eŭgeno Miĥalski (1897-1937). Red. William Auld. Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1994. 176p. ISBN 90-71205-54-1. 21cm. Kun studo de Krys Ungar. Ĉiuj trovitaj verkoj de unu el la plej grandaj Esperanto-poetoj. 31,80 gld.

Por plurlingveco de Eŭropo. Für Europas Mehrsprachigkeit. Werner Bormann, Helmar Frank. Dulingva. Berlin & Paderborn: Akademie Libroserve, 1994. 167p. ISBN 3-929853-02-7. 21cm. Du prelegoj (1993) pri la lingvaj situacio kaj perspektivoj de Eŭropa Unio. 28,50 gld.

Pri bredado de abeloj. A.P. Andersen. El la dana trad. H.N. Nederland. Rudkøbing: SEFO, 1943. 102p. 21cm. Kompletma manlibro, ne perdinta aktualecon. 9,00 gld.

Quale "lingua perfetta"? Imperialismo linguistico dell'inglese e soluzione federale europea. Guy Héraud, Claude Piron,



Hazarda renkonto de du grandaj rusoj: apud Plena poemaro de Miĥalski, jen la originala romano Sen titolo de Ŝirjaev, el 1904 (?), kiu povus montri la literatura sensacio de la jaro.

John C. Wells, Umberto Broccatelli, Giorgio Pagano. Ed. Andrea Chiti-Batelli. Manduria/Bari/Roma: Lacaita, 1995. 167p. 22cm. Ital-lingva. Pri la "lingva imperiismo de la angla kaj la federalisma solvo por Eŭropo". Artikoloj kaj prelegoj kun komentoj de la editoro. 15,00 gld.

Safat lo jadati eshmah. Jeremi Gishron (1948). Jerusalem: Centro Sivron, 1994. 12p. 21cm. Anglalingva. Nova klarigo pri "la lingvo nekonata" de Psalmo n-ro 81. 4,50 gld.

Sen titolo. Ivan G. Ŝirjaev (1877-1933). Editoris Herbert Mayer kaj Ed Borsboom. Vieno: Pro Esperanto, 1995. 336p. ISBN 3-85182-020-7. 24cm. La aventuroj de rusa Esperanto-pioniro en 1897-1898. Probable la plej frue verkita originala romano, kies manuskripto ĝis nun dormis en la Internacia E-Muzeo de Vieno. 48,00 gld.


Tiel profunda estas la nokto. Villy E. Risor. El la dana trad. Svend Dragsted k.a. Centra Dana E-ista Ligo, 1959. 110p. 21cm. Ilus. Historioj kun afrika fono. 6,00 gld.

Verda radio, La (1882). Jules Verne (1828-1905). El la franca trad. Jeannine Vincent. Paris: UFE, 1995. 64p. 21cm. Unua parto. En la tipa sfero de angla banloko la alloga Elisabeth kaj ŝiaj du strangulaj onkloj senlace serĉas la originon de mistera verda lumradio. 10,80 gld.

Vivi estas miri. Lectures pour débutants. Claude Piron (1931). Vienne: Pro Esperanto, 1995. 112p. ISBN 3-85182-026-6. 23cm. Kvar facilaj rakontoj kun paralela franca teksto kaj abundaj klarigoj. 21,00 gld.

Vivo feliĉa. Divaldo Pereira Franco. El la portugala trad. Osvaldo Pires de Holanda. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1994. 210p. 16cm. Ducent konsiloj. 9,90 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!



Mazi en Kongreslando

Dum la UK en Tampere funkcios "Mazi-stando" (22-28 julio), kie antaŭpagintaj kongresanoj povos ricevi sian Mazi-kompleton, dirante la numeron de la pago. Bv. ĉehavi ankaŭ kongressildon.

La kompleto — en skatolo — konsistas el du vidbendoj 90-minutaj, instrulibro, kaj sonkasedoj kun la dialogoj de la filmo. La sama kompleto estos libere aĉetebla ĉe la kongresa libroservo.



Aranĝoj: Du nuligoj

Ĝuste kiam ŝtata subvencio estis garantiita, la kontraŭ-rasisma seminario en Glienecke/Berlino, planita por 12-14 majo, devis esti nuligita pro manko de partoprenantoj. (*Berlina Informilo*)

Aliflanke, Eurokka ne povas aranĝi en aŭgusto sian Pop' & Rok' Esperanto-Festivalon Internacian, pro manko de subvencioj.

Arto: Per-Esperanta ekspozicio

Dank' al siaj E-kontaktoj kun la hungara urbo Pápa, la germanaj geedzoj Rita Rössler-Buckel kaj Franz-Georg Rössler ambaŭ ekspoziciis tie en aprilo. En la urba teatro ŝi montris pentraĵojn kun klarigoj hungaraj kaj Esperantaj, dum en la urba biblioteko la vicurbestro inaŭguris lian ekspozicion pri dudek jaroj da komponado, verkado, skulptado kaj grafiko. Ĉe la malfermo urbaj muzikistoj ludis verkojn de Rössler, i.a. premiere la pecon "Pastorale por Pápa". Gazeto kaj televido raportis pri la eventoj.

Fotografio: Balta arkivo

Latva kaj Litova E-Asocioj komune aĉetis la foto-arkivon de Aleksandrs Strautmanis, 80-jara esperantisto el Riga. La 14 212 negativoj kun kontrolaj fotoj, kiuj spegulas la historion de la E-movado en la baltaj landoj ekde 1959 ĝis 1991, estos gardataj en la E-centro de Kaunas. (*Litova Stelo*)

Informado: Pli ol infanaĵo

Laŭ propono de Antoine Vonnnet, la franca kabla televido Canal J faris raportaĵon dum internacia infanrenkontiĝo en Grezilhono. Al demandoj de kvin infanoj, ne konantaj Esperanton, respondis Michel Audibert, Esperanta teatraro. La raporto dissendiĝis kvarfoje (27-29 majo), en la kvaronhora porinfana programo "Rigardu la mondon".

La hungara televido prezentis Esperantaĵon en simila daŭro (20 minutoj), sed en ĉefa spektahoro vespera: la 20-an de aprilo Károly Fajsz malfermis sian impresan E-kolekton al milionoj da spektantoj de babilprogramo.

Kvinminuta intervjuo kun Eva Formaggio pri E-o estis dissendita al Suda kaj Orienta Azio fare de Deutsche Welle, germana radio por eksterlando, la 30-an de aprilo.

Junularo: Ankaŭ TEJO pintkunvenis

Prepore al la Monda Pintkunveno de UN por Sociala Evoluo (MPSE)

en Kopenhago komence de marto, renkontiĝis ankaŭ 150 reprezentantoj de 13 internaciaj junularaj organizoj, kiuj ellaboris dokumenton por prezento al MPSE. TEJO partoprenis kaj — dank' al surloka kunlaboro de Jimmy Stryhn Meyer — eĉ oficiale kunorganizis la konsultiĝon. Ĉi-okaze TEJO starigis kunlaboran rilaton kun la Junulara Fakto de UN en Novjorko, ĉe kiu ĝi estos reprezentata de Jozef Truong kaj Daniel Cuthbert. (*TEJO Tutmonde*)

Po unu TEJO-ano el Ĉinio, Japanio, Koreio kaj Rusio laboris en 22-kapa internacia tendaro apud Vladivostoko (15-31 marto), organizita de Unesko-branĉo pri volontula laboro kaj subvenciita de la japana firmao Mitsubishi. Laŭ *Movado*, revuo de Rusia Esperantista Unio, ĝi "estis la unua sukcesa TEJO-labortendaro dum [la] lastaj 7-10 jaroj".

Lingvopolitiko: Radikala alvoko

"Esperanto" Radikala Asocio (Skr. Giorgio Pagano, Via di Torre Argentina 76, IT-00186 Roma, Italio) kolektas subskribojn por sia alvoko, sendota al ĉiuj koncernaj instancoj, kiu petas i.a. ke Esperanto estu instruata en diversgradaj lernejoj de Italio; ke la itala ŝtato subtenu en internaciaj forumoj la uzon de Esperanto; ke la instancoj de Eŭropa Unio realigu studon pri E-o kiel ebla federacia lingvo kaj eksperimenton pri ties instruado; ke Unesko konsideru konvencion pri la disvastigo kaj adopto de E-o kiel internacia helplingvo. (*L'Esperanto*)

Literaturo: Traduku el la hispana

La Premio Inés Gastón (libroj por 15 mil pesetoj) de la hispana Fondaĵo Esperanto estos aljuĝita al traduko el la romano de hispana aŭtoro el la 20-a jarcento. Konkursaĵojn sendu ĝis la 30-a de septembro al la sekretario, kiu donas pluajn informojn: Enrique Piquero, Morería 6-5° D, ES-50004 Zaragoza, Hispanio. (*Boletín*)

Teatro: IJK naskis trupon

Dum la Tutlanda Vintra Renkontiĝo de Korea E-asocio (24-26 feb., Taegu), kiun partoprenis ĉ. 60 e-istoj, nove naskita trupo prezentis la teatraĵeton *Oficeja ĝangalo*, en kiu ĉefrolulo forte kritikis burokratismon malhelpan al mediprotektado. La trupo konsistas plejparte el LKK-anoj de la 50-a IJK. (*La Lanterno Azia*)



Etnismo: Eksportebila ekspozicio

Invitite de la 25-jariĝanta loka E-klubo, Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL) realigis en Pfaffenhofen (Germanio) la ekspozicion "Eŭropo parolas 100-lange" (8-12 apr.). La IKEL-prezidanto Uwe Joachim Moritz prelegis samtempe ĉe la malfermo, kiun ĉeestis 45 personoj, i.a. la urbestro kaj deputito el la bavara parlamento. La ekspozicio estas montrebila en germanlingvaj landoj kaj, post adapto, ankaŭ aliloke. Kontaktu IKEL: Im Römerfeld 44, DE-52249 Eschweiler, Germanio.



Brazilo: Zamenhof savita

Sur placo de Salvador (ŝtato Bahio) de 23 jaroj staras Zamenhof-busto. Lastan decembron ordono urbestra celis forigi ĝin al fer-rubejo, sed pro reago de lokaj e-istoj la respondeculoj ŝanĝis la decidon. (*Brazila Heroldo*)

Francio: Tri Tuluzaj agadoj

Kunlabore kun la urba Kinoteko, E-Kultur-Centro en Tuluzo aranĝis la 20-an de marto debat-vesperon kun la preleg-turneanta Lev Vulfoviĉ (Moskvo), sekve al projekciado de la filmo *Moskvo ne kredas al larmoj*. Dum la Internacia Foiro de Tuluzo (25 marto - 3 aprilo) EKC uzis budon por informado, kun modesta sukceso. Balota mitingo (12 aprilo) de la ver-dula kandidatio je prezidenteco, Dominique Voynet (vd. majo, p. 99), generis same multe da kontaktoj en du horoj kiel la Foiro estis farinta en dek tagoj.

Hispanio: Marborda somerkurso

En la marborda, turisma urbeto San Javier daŭras trimonata E-kurso kun 40 lernantoj. Apogas ĝin la urbestro, kiu subtenos ankaŭ someran kurson por eksterlandanoj. Gratulu la konsilianinon pri kulturo: S-ra Antonia Cler, Ayuntamiento de San Javier, Concejalía de Juventud y Cultura, ES-30730 San Javier (Murcia). (*Norvega E-isto*)

Japanio: Provperiodo

La nova seminario de Japana E-Instituto en Yatugatake (vd. nov., p. 181) akceptis dum sia pasintjara provperiodo 706 gastojn (479 tranoktaj). La domo estis fermita vintre, ĝis la 1-a de aprilo. Laŭ alvoko de la JEI-estraro, kolektiĝis por ĝi donace pli ol 6 mili-onoj da enoj (ĉ. 107 mil gld.).

JEI starigis fonduson por suferintoj de la januara tertremo kaj esceptis ilin el unujara membrokoto. (*La Revuo Orienta*)

Jugoslavio: Telefonis kabeintoj

La 12-an de feb. en Kragujevac la e-istoj Tereza Kapista kaj Saša Pilipović, aktoro, gastis ĉe la loka televido. Post la 40-minuta programo telefonis multaj interesatoj, precipe gejunuloj kaj eks-esperantistoj. La postan tagon Kapista prelegis en gimnazio. Sekve, 50 lernantoj deziris kurson, kiu startis ĉe "laborista universitato" la 4-an de marto. (*InfoSEL*)

En Niš televid-elsendo vespera prezentis, la 11-an de feb., la agadon de la urba kaj la fervojista E-asocioj. (J. Nešić)



Tanzanio: Esperanto abunda en Bunda

Dank' al monhelpo de Eduka Fondaĵo Carson, la tanzania E-"veterano" (34-jara) kaj loka delegito Mramba Simba organizis kurson por 16 infanoj kaj gejunuloj en la infanfleĝejo de sia urbo, Bunda, de la 24-a ĝis la 29-a de marto. Instruis kun li Mulele S. Mbassa kaj Sylvester N. Nyinyimbe. La kurson malfermis la ĉef-flegistino, kiu donacis unu ĉambron al la E-klubo de Bunda. (Adreso: S.L.P. 51, Bunda, Mara, Tanzanio.) Ĉe la fermo, la distrikta eduk-reprezentantino plantis memor-arbon kaj promesis helpi la instruadon de Esperanto per kajeroj kaj kretoj.

OFICIALA INFORMILO

NOVJORKA OFICEJO DE UEA
SUBTENANTO (minimumo \$25):
Meksiko: Julie L. Regal.

PATRONOJ DE TEJO 1995

Belgio: Alexandre Humet. Francio: Dominique-O. Couturier; Denise M.H. Loisel; Daniel Maynaud; Richard Cash; Frato René-Jean Marmou. Norvegio: Margrete Landmark. Sume por 1995 ĝis nun 91 Patronoj.

SOCIETO ZAMENHOF 1995

Francio: Paul Coulot. Germanio: Marieta Moschner. Hispanio: Josep Castellort i Riba. Italio: Maria Teresa Malatesta. Japanio: Kyōhei Nakazima. Nederlando: P. H. Damsté; W. C.

Keizer; Willy Keizer. Svedio: Lennart Svensson. Usono: Alberta S. Casey; Catherine L. Schulze; Gigi Harabagiu. Sume por 1995 ĝis nun 250 SZ-anoj.

DONACIOJ 1995 (gld.)

ĝis la 30-a de aprilo

Fondaĵo Afriko: Japanio: K. Lendon 11,20. Nederlando: W.C. Keizer 50,00; Fam. W. Koopmans 50,00. Svedio: J. Hammarberg 21,40. Sumo ĉi-jara 3349,27.

Fondaĵo Ameriko: Kanado: N. Fleury 22,40. Sumo ĉi-jara 683,73.

Biblioteka Fondaĵo: Kanado: B. Crisp 112,00. Sumo ĉi-jara 112,00.

Fondaĵo Canuto: Aŭstrio: F. Valim 23,06. Francio: G. Letzgus 32,00.

Japanio: (por aziaj e-istoj) Y. Aida 74,40; O. Eguti 37,20; K. Hirose 37,20; K. Huzimaki 37,20; T. Huzita 37,20; Y. Izumi 37,20; K. Kai 74,40; T. Koyama 55,80; E-Kai Miyazaki 37,20; S. Okutu 37,20; T. Saitou 74,40; H. Tai 37,20. Kanado: N. Fleury 24,64. Nederlando: W. C. Keizer 50,00. Sumo ĉi-jara 4376,75.
Ĝenerala Kaso: Usono: S.M. Klimowicz 133,13. Sumo ĉi-jara 2761,40.
Konto Espero: Francio: G. Letzgus 32,00; H. Mougin 19,20; R. Picou 16,00; P. Rocheron 32,00. Kanado: N. Fleury 22,40. Sumo ĉi-jara 1064,60.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Douglas B. Gregor (1909-1995)



Douglas Bartlett Gregor, Honora Membro de UEA ekde 1989, mortis la 26-an de marto en Northampton (Britio).

Gregor naskiĝis la 6-an de februaro 1909 en Swansea (Kimrio). Iĝinte magistro pri klasikaj lingvoj en la universitato de Oksfordo (1932), li instruis tiujn kaj la italan lingvon (1933-39, 1947-) en gimnazio. Dum la dua mondmilito li servis kiel interpretisto pri la germana kaj itala. Gregor regis dudekon da lingvoj. Li publikigis aŭtoritatajn verkojn pri la lingvoj kaj dialektoj de Nord-Italio — precipe la

friula —, kaj komparan studon pri ses keltaj lingvoj.

Jam kiel 14-jarulo li lernis Esperanton kaj aliĝis al la brita E-movado. Post la mondmilito li gvidis kursojn, prezidis Societon de Britaj E-istoj (1954) kaj redaktis *Brita Esperantisto* (1959-1962).

Ekde 1964 Gregor membris en la Akademio kaj, inter 1965 kaj 1971, estris ties sekcion pri gramatiko. Por Centro de Esploro kaj Dokumentado li kompilis informojn pri nacilingvaj tradukoj faritaj el aŭ per Esperanto.

Lia filologia verkaro Esperanta konsistas el multaj artikoloj, pluraj broŝure aperintaj, kiel *La Esperanta traduko de la Malnova Testamento* (1958), *La fontoj de Esperanto* (1956, 1982), *La kresko de la Esperanta vort-provizio en la unuaj tri jaroj* (1986), *La Zamenhofa teksto de la Malnova Testamento* (1988) aŭ *La kultura valoro de Esperanto* (1965, angla lingve; 1967, 1979). Lia traduko de la Sofoklaj dramoj *Reĝo Edipo* kaj *Antigona* eldoniĝis ĉe Stafeto (1960).

Douglas B. Gregor apartenis al tiu intelekta elito de la esperantistaro kiu servas per sia klasika erudicio la bonon de nia kulturo.

Erik BRENANDER (1903-1994), dumviva membro en Kvänum (Svedio), mortis la 22-an de aŭgusto 1994.

Mauno LAUTTIO (1905-1995), kiu prezidis dum 24 jaroj la E-klubon de Tampere, forpasis la 2-an de januaro.

Aaf A. LAVERMAN (1912-1995) mortis la 4-an de aprilo en Groningen (Nederlando). Ŝi estis mecenato de UEA kaj dumviva membro.

Elizabeth M. MAASBOMMEL (1908-1995), dumviva membro kaj mecenato, forpasis la 19-an de marto en Roterdamo, kie ŝi membris preskaŭ 60 jarojn en la klubo Merkurio.

Leo McDONALD (1922-1995), sekretario de la Londona klubo, delegito en Ilford, forpasis la 13-an de marto.

Karl NELL (1905-1995), delegito dum 28 jaroj en Rochester (NY, Usono), aktivo de homrajtaj movadoj kaj de SAT, mortis antaŭ kelkaj monatoj.

Nicola TALLARICO (1927-1995), fakdelegito pri kooperativismo en San-Paŭlo, forpasis antaŭ nelonge.

Petras M. URBAITIS (1911-1994), dumviva membro, litovo, salezana pastro, mortis la 10-an de julio 1994 en San-Paŭlo. Li vivis en Ĉinio, Italio kaj Brazilo. Pro sia misiista laboro li estis en 1950 torturita kaj malliberigita por unu jaro en Ĉinio.

Oskari Lehtivaara (1909-1995)



En Helsinko, la 7-an de aprilo, forpasis Oskari Lehtivaara.

Lehtivaara naskiĝis la 4-an de februaro 1909 en malriĉa kampara familio. Blinda ekde sia sepa vivo-

jaro, li kun eksterordinara persisto atingis multflankan klerecon, kaj lernis Esperanton jam je 13-jara aĝo.

De 1937 ĝis 1982 li oficis kiel vic-prezidanto, poste kiel prezidanto, de Steleto, la Esperanta ligo de finnaj blinduloj. Dank' al li, jam antaŭ la milito eldoniĝis brajla E-lernilo por finnoj. En 1950 li kunfondis Ligon Internacian de Blindaj E-istoj (LIBE),

kies sekretario li restis ĝis 1962. En 1957 li iniciatis la plurlingvan — i.a. Esperantan — bildlibron *Finnlando hieraŭ kaj hodiaŭ*.

En 1969 li servis kiel LKK-ano de la Helsinka UK. Li estis komitatano de UEA (1969-1981) kaj tutan jardekon prezidis E-Asocion de Finnlando (1975-1985). Dum tiu tempo EAF ekhavis propran sidejon kaj reldonis *Kalevala* per granda ŝtata subvencio — unuavice dank' al lia organiza lerto.

En 1986 aperis la finnlingvaj rememoroj de Lehtivaara, *Perintö* ("Heredaĵo"), en kiu unu ĉapitro rakontas lian E-agadon.

Li estis fakdelegito de UEA ekde 1953, honora prezidanto de EAF, honora membro de LIBE kaj, de post 1990, de UEA.

ANONCETOJ

Antropozofaj esperantistoj, ĉu vi ekzistas? Se jes, kontaktu s-ron Börje Eriksson, Kyläkatu 140, FI-15700 Lahti.

Sociallaboruloj, kiuj interesiĝas pri fono de propra faka asocio, skribu al: Soile Lingman, Västeråsgatan 4, 113 43 Stockholm, Svedio.

La adreso de s-ino Truus van Woerden ekde majo estas: Nocturnestraat 78, 2553 TL Den Haag, Nederlando; tel. +31/70/397-17-60.

Deziras korespondi tutmonde tri fratoj, EGBARE Tchao Paul, Paulin K. kaj Cosmos H., B.P. 20593, Résidence du Bénin, Lomé, Togolando.

Kiu povas indiki al mi kie trovi jenan libron, eldonitan en 1927 en Ĥarkov: Karmanov N., *Zoologiala Lexiko Rusa-Ido?* W. de Smet, Hertendreef 12, BE-2920 Kalmthout, Belgio.

jubileo

jarcento de esperanto

Impona memorlibro kun raportoj pri la festado de la centa jaro de Esperanto tra la mondo kaj kun artikoloj, kiuj resumas la unuan jarcenton. Ĉio en ĵurnalisme vigla aranĝo kaj ilustrita per preskaŭ 200 fotoj.

Red. Mark Fettes. Rotterdam: UEA, 1988. 24cm. 162p. Prezo: 39,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

AVIS RENT A CAR

Ĝuu vian restadon ĉe la 80-a Universala Kongreso de Esperanto en Finnlando kun fidinda **AVIS**-aŭtomobilo.

Tiu ĉi kupono rajtigas vin al **SENPAGA**

altigo de kategorio en la grupoj A ĝis D.

Menciu tiun ĉi oferton farante rezervon ĉe via vojaĝagentejo aŭ plej proksima **AVIS**-oficejo.

AVIS Tampere Tel. 358-31-2134 944
AVIS Finnlando Tel. 358- 0-8598 333

Al la laboristoj en ĉiuj landoj unu lingvon!



Ilustrita historio de la laborista Esperanto-movado

Eld. Fritz-Hüser-Institut, Dortmund 1993, 115p. Prezo: 10,80 gld.

Enhavas i.a. historion de la Germana LEA, kronikon de la tutmonda movado, artikolon pri esperantistoj en la hispana milito kaj bibliografion pri la laborista Esperanto-movado. Dulingva (Esperanta-germana).

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto rekomendinda por komencantoj bela kaj moderna diversa kaj amuza interesa por ĉiuj

KONTAKTO estas gazeto por ĉiu, kiu serĉas interesan legadon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KONTAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1995 **KONTAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.

ABONTARIFO 1995

Aŭstralio	30 dolaroj	Francio	125 frankoj	Nederlando	41 guldenoj
Aŭstrio	245 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	765 frankoj	Hispanio	2100 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	32 guldenoj	Portugallio	2500 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	30000 liroj	Svedio	170 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj



TEJO lotumos valorajn premiojn inter ĉiuj abonantoj. Bonŝancon!



Tendaraj tagoj

tri kajeroj

- specife por junuloj 10- ĝis 14-jaraj
- speciale emfazas parol-kapablon
- alloge ilustrita de Pavel Rak
- kun notoj por instruistoj



Verkis Stefan MacGill.
Eldonis ILEI/UEA/HJEA.



Prezo: 12,00 gld. por la unua, 15,00 gld. por la dua kaj 18,00 gld. por la tria kajero. Triona rabato ekde 3 ekz. ĉe UEA.

LIBRO DE AMO

"Leganto, se vi estas pruda
Kaj naŭzas vin la amo nuda ..."

... tiam nepre ne aĉetu ĉi tiun faman majstroverkon de la Esperanta erotika poezio, kiu malkovris al tiom da geesperantistoj la misteron kaj belon de sekso.

Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter. Byblos: Je la ŝildanenco de "L'Akacio", 1969. 262p. 20cm. Enhavas la senpudoran *Sekretaj sonetoj* (1931) k.a. Prezo: 21,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Patrino koro

Simplaj, romantikaj
rakontoj pri la
esperantista vivo

Nevena Nedelčeva. Rotterdam / La Laguna: UEA/Stafeto, 1988/1975 (eld./preso). 148p. 17 cm. Prezo: 12,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

KONGRESO ĈE KILIMANĜARO

La Kvara Afrika Kongreso de Esperanto okazos ĉe Kilimanĝaro en Tanzanio, de la 28-a de decembro 1995 ĝis la 2-a de januaro 1996. Scivolu jam nun pri flugkaravano kaj aliaj detaloj, kiujn vi trovos en nia venonta numero.

La plej granda en la mondo!



LIBROSERVO DE UEA

Stokas ĉiun haveblan Esperanto-libron •
Rabatas ekde tri ekzempleroj • Sendokostoj
nur 10% • Rapida servo • Katalogo 9,00 gld.

Sanigas nekuraceblajn malsanojn, bonigas farton,
donas energion, natura kaj facile lernebla

YUMEIHO-TERAPIO

Orienta Speciala Diina Masaĝo

Koksoston Ĝustiga Premkneda Terapio
de profesia terapiisto Masayuki Saionji.

Dua eldono, reviziita kaj grandigita, riĉe ilustrita.

Prezo 21,00 gld. (rabato 33% por min. 3 ekz.).

Mendebla ĉe la Libroservo de UEA.

Videobendon en diversaj sistemoj (en Esperanto
kaj aliaj lingvoj) mendu por 80 gld. ĉe:

Internacia Instituto de Preventa Medicina Praktiko,
CPO Box 405, Tokyo, 100-91, Japanujo.

Stelo-moneroj denove haveblaj!

Universala Ligo transdonis al UEA la tutan
restantan stokon de la stelo-moneroj, tiel ke
la unika kolekto de tiuj numismatikaĵoj estas
denove aĉetebla.



★ **Kompleto de stelo-moneroj.**
Kvar moneroj de 1, 5, 10 kaj 25
steloj. Vidu apartajn priskribojn ĉi-
sekve. **Prezo: 75 gld.**


★ **Monero de 1 stelo.** Bronza.
Diametro 20mm., dikeco 1,5mm,
pezo 3,4gr. Havebla nur en kom-
pleto (vidu ĉi-supre).

★ **Monero de 5 steloj.** Latuna.
Diametro 23,5mm., dikeco 1,7mm.,
pezo 5gr. **Prezo: 4,80 gld.**

★ **Monero de 10 steloj.** Kupro-
nikela. Diametro 28mm., dikeco
2mm., pezo 9gr. **Prezo: 9,90 gld.**

★ **Monero de 25 steloj.** Argenta
(90%). Diametro 38mm., dikeco
2,5mm., pezo 19gr. **Prezo: 60 gld.**

*Triona rabato ekde 3 ekz. de la sama
monero aŭ de 3 kompletoj. Aldoniĝas 10%
por afranko kaj (por klientoj el Eŭropa
Unio) 17,5% por imposto. Mendu ĉe UEA!*



La Jarlibro akompanos vin tra tuta jaro... donu taŭgan veston al ĝi!

UEA ofertas elegantan bonkvalitan platan
kromkovrilon por via Jarlibro. Mendu ĝin
kontraŭ 1,80 gld. (+ afranko kaj, ene de EU,
imposto de 17,5%). Triona rabato ekde 3 ekz.

JAM PLI OL 1000 VENDITAJ!



Nova Esperanta Krestomatio
redaktita de William Auld

- klasikaj ekzercoj
- originalaj rakontoj
- ĉerpaĵoj el la mondliteraturo
- studoj "el vivo kaj sciencoj"
- prilingvaj artikoloj

kaj du unikaj antologietoj:

- La Esperanta Muzo
(la Majstro, la lingvo, la Ideo, satiro)
- Internacia Liriko
(specimena poemaro el 73 lingvoj)

Jubilea Kolekto n-ro 5. 509 p. 21 cm. Tole bindita kun kromkovrilo kaj paĝosigno.
57,00 gld. Mendu ĉe la Libroservo de UEA: triona rabato ekde tri ekzempleroj.